

EL POPOLA

ĈINIO

中國報道

7

1978






Akvon, akvon, akvon!



Venu, fremdlandaj geamikoj, ni dancu kune!

La Akvoverŝa Festo de ĉinaj tajoj

Al la Akvoverŝa Festo






Konkurso de drakboatoj

Nokto de la festo





Ludo de draklanterno





Pavo-danco

Veršu, kantu!





Foiro

Priverŝi unu alian por longa vivo kaj abunda rikolto



EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1978

N-ro 7

(238)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

P. 1. Gejunuloj de la ĉina tajnacieco

P. 4. Taĝika danco (ĉinstila pentraĵo)



Enhavo

Vizito de Prezidanto Hua Guofeng al Koreio	2
Nova leviĝo de la azia kontinento	9
Inĝenierad-termofizikisto Vu Ĝonghua	16
Kreado de dentrada mezurilo	19
Antaŭe ŝpinteksistino, nun vicministrino	21
Pri nuntempa instruado de matematiko	23
Pri ekspozicio de metiartaĵoj	25
Homoj kriplaj tamen nesenuutilaj	28
Kanto de la juneco (Daŭrigo)	30
Taj-a popolo celebris la Akvoverŝan Feston	34
EN PEKINO: La Imperiestra Palaco	36
KURANTAJ AFEROJ	40
AMIKECO: Francaj kamparaj pejzaĝoj en Ĉinio	41
Finlandaj muzikistoj en Ĉinio	42
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Kontraŭimperiisma patriota Jihetuan-movado	43
KALEJDOSKOPO: La bebfiŝo	45
Huabiaŭ — ornamita marmora kolono	46
Kvin-gusta kokofemuro stufita	46
ESP-NOVAĴOJ	47

Vizito de Prezidanto

FRU MATENE de la 5-a de majo, unu speciala trajno malrapide veturis de la urbo Dandong ĉe la norda bordo de Jalu-rivero en la stacion Sineuijoo ĉe la suda bordo. De tiam Kamarado Hua Guofeng, prezidanto de CK de KPC kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro,

komencis sian unuafokan viziton al fremdlando, amikan viziton al nia intima najbaro — la heroo Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

Ĉie svingiĝis floroj kaj flirtis ruĝaj flagoj ĉu en Pjongjang aŭ en aliaj lokoj. . . Jubilis la

Mitingo en Pjongjang por varme bonvenigi Prezidanton Hua Guofeng




Hua Guofeng al Koreio


korea popolo, jubilis ankaŭ la ĉina popolo pro tiu nova grava paĝo en la amikeca historio de Ĉinio kaj Koreio.

Je kvindek minutoj post la dekonua antaŭtagmeze Prezidanto Hua Guofeng intervidiĝis kun Prezidanto Kim Il Sen en la stacio Pjongjang.

Ili intime manpremis — tio estis manpremo de la du popoloj kun komuna travivaĵo kaj komuna batalcelo. Je la intervidiĝo Prezidanto Kim diris: “Bonvenigon al vi!”, kaj Prezidanto Hua diris: “Mi tre ĝojas, ke mi vidas Prezidanton Kim.”

Prezidanto Hua varme manpremas kun Prezidanto Kim.





Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim en interparolado

Ĉi-foja intervidiĝo de la gvidantoj de Ĉinio kaj Koreio estis renkontiĝo de la malnovaj amikoj, ĉar Prezidanto Kim intervidiĝis unuafoje kun Kamarado Hua Guofeng en Pekino en la 18-a de aprilo, 1975. Sed ilia intervidiĝo ĉi-foja en Koreio havis pli profundan kaj neordinaran signifon, ĉar Prezidanto Hua Guofeng, kiel daŭriganto de Prezidanto Maŭ Zedong, faris oficialan amikan viziton al Koreio, daŭrigante la revolucionan aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj alte tenante la amikecan standardon de Ĉinio kaj Koreio.

En la tagoj de sia vizitado Prezidanto Hua ĉiam dronis en varma amikeco. La popolanoj de Pjongjang kaj Hamheung bonvenigis Prezidanton Hua en senprecedence granda skalo. Oni prezentis al li aromajn florbukedojn kaj donacaĵojn simbolantajn la batalan amikecon, ŝutis sur lin buntajn paperflorojn kaj kolorajn rubandojn kaj dancis por li ĉinajn kaj koreajn dancojn. Sennombraj sloganoj estis okulfrape skri-

bitaj sur bele ornamitaj arkpordegoj, diversaj bildoj aŭ lititaj al koloraj balonoj ŝvebantaj en la aero. La grandaj vortoj en ĉina kaj korea lingvoj “amikeco”, “unuiĝo” kaj “Ĉinio — Koreio” kaj modeloj de kunligo de Pjongjang kaj Pekino per ĉielarko estis alte starigitaj ĉe stratoj. Tra la ĉielo ŝvebis “Kanto de Prezidanto Hua” kaj “Kanto de Generalo Kim Il Sen”. “Vivuo” kaj “bonvenigo” ruliĝadis, kiam Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim en aŭtomobilo trapasis la amikecan koridoron formitan el bonvenigantoj de Pjongjang longan je 10 km. kaj tiun de Hamheung longan je 15 km. Kien Prezidanto Hua kaj lia sekvantaro iris, tie ili ricevis varman bonvenon. Artistoj de Koreio komponis “Kanton por Bonvenigi Prezidanton Hua”. Pli ol 50,000 infanoj prezentis gimnastikon, kiu formis ruĝajn vortojn “Vivu Kamarado Hua Guofeng, saĝa gvidanto de la ĉina popolo!”, luman kolosan portreton de Prezidanto Hua, kortuŝan bildon “Prezidanto Hua ascendis Tian-anmenpordegon” kaj grandan scenon de la nova longa

marŝo de la ĉina popolo sub la gvido de Prezidanto Hua por efektiviĝi la kvar modernigojn. Tio profunde esprimis varman gratulon de la korea popolo al la ĉina popolo pro tio, ke ĝi havas novan stiriston de la ĉina revolucio! Gim-ganŝan-monto estas fama pitoreskejo de Koreio. Prezidanto Hua ne havis tempon por ĝin viziti pro longtempa interparolado kun Prezidanto Kim. Por ke Prezidanto Hua vidu la belan pejzaĝon, la popolo de Hamheung speciale starigis kolosan modelon de la monto sur strato. Kiam Prezidanto Hua trapasis tiun lokon, multaj virinoj ekdancis kvazaŭ feinoj akompanate de ĥoro el centoj da kantistinoj.

Ĝuste en tia varma amikeca atmosfero Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim plurfoje faris interparoladon. Laŭ la tendenco de disvolvo de la nuna situacio ili interŝanĝis opiniojn pri plifortigo de la batala amikeco kaj revolucia

uniigo inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Koreio kaj pri internaciaj problemoj interesaj al ambaŭ flankoj. Iliaj vidpunktoj estas tute samaj, ĝuste kiel Prezidanto Kim Il Sen montris: "Ĉi tie klare montriĝas ke niaj opinioj kaj starpunkto estas tute samaj." La interparoloj pliprofundigis ilian interkomprenon kaj pliintimigis la interrilaton. Ĝi certe donos profundan influon al la komuna batalo de la du popoloj kaj pliapaŝe akcelos disvolviĝon de la unuiĝa kaj progresiva afero de la revoluciaj popoloj de la tria mondo kaj de la mondo. Ĉi-foja historia intervidiĝo akiris plenan sukceson.

La batala amikeco kaj revolucia uniigo de la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Koreio, persone kulturita de Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto Ĉefministro Ĝou Enlaj kune kun Prezidanto Kim Il Sen,

Prezidanto Hua vizitas malnovan loĝejon de Prezidanto Kim.





Prezidanto Hua vizitas la vinilonan fabrikon de Hamheung akompanate de Prezidanto Kim.

hodiaŭ ĉiam plifirmiĝas kaj disvolviĝas sub la zorgo de Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim. Ĉi-foja intervidiĝo de la du gvidantoj puŝis la grandan amikecon inter Ĉinio kaj Koreio al la nova kulmino.

Ĉina proverbo diris: Kora amikeco kuŝas en kora interkompreno. La du partioj kaj la du landoj de Ĉinio kaj Koreio respektas kaj egale traktas unu la alian, subtenas reciproke kaj kunlaboras intime. Dum la pasinta duonjarcento niaj du popoloj same suferadis agresadon de imperiismo kaj kune ĝuis ĝojon de venko akirita dank' al ŝultro-ĉe-ŝultra batalado. Prezidanto Maŭ iam diris: "En la historio, vi helpis nin, kiam ni renkontis malfacilojn; kaj ankaŭ ni helpis vin, kiam vi renkontis malfacilojn." Sur la kvinstela ruĝa flago de la Ĉina Popola Res-

publiko koaguliĝis sango de koreaj revoluciaj martiroj, kaj Koreio en la socialisma konstruado ankaŭ tenas en la koro amikecon de la ĉinaj kunbatalantoj. Oni ne povas esprimi per vorto tian amikecon plej sinceran de kunbatalantoj en la homa mondo, tian amon de kamaradoj kaj tian plej grandan subliman solidarecon de proletaria internaciismo.

Sur la nuna revolucia vojo la batalo kontraŭ la komuna malamiko strikte ligas niajn du popolojn. La pulsoj de la du popoloj samtakte batas, kaj ili kune klopodas por unuigi la trian mondon kaj subteni revolucionan batalon de la subpremataj popoloj kaj nacioj. La ĉina popolo subtenas Koreion en la justa afero de memstara paca unuiĝo de la patrolando kaj la korea popolo subtenas Ĉinion en la sankta batalo por liberigi

Tajvan-provincon. Ili vaste interŝanĝas sian sperton, lernas unu de la alia kaj kuraĝigas unu la alian en la socialismaj revolucio kaj konstruado. Precipe estas neforgeseble kiam la ĉina popolo perdis sian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ Zedong, la estimatajn Ĉefministron Ĝoŭ Enlaj kaj Prezidanton de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso Ĝu De, la koreaj kamaradoj dividis la malĝojon kun la ĉina popolo; kaj kiam la ĉina popolo celebris la grandan venkon super la “kvarpersona bando”, la koreaj kamaradoj ĝojis kune kun la ĉina popolo kaj varme gratulis la ĉinan popolon, ke ĝi denove havas sian saĝan gvidanton kaj ke Kamarado Hua Guofeng estis nomumita kiel prezidanto de CK de KPCĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

Prezidanto Kim Il Sen plurfoje vizitis Ĉinion kaj plurfoje intervidiĝis kun Prezidanto Maŭ Zedong. Ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ plurfoje vizi-

tis Koreion. La ĉina popolo neniam forgesos, ke Koreio estas la lando, kiun lastfoje vizitis Ĉefministro Ĝoŭ antaŭ sia forpaso. Koreaj kamaradoj tiel laŭdis la viziton de Ĉefministro Ĝoŭ al Koreio ke ĝi “faris elstaran kontribuon por fortigi la grandajn batalan amikecon kaj unuiĝon inter la du popoloj de Ĉinio kaj Koreio”, kaj tio “restos por ĉiam en nia koro”.

Kiam Prezidanto Hua vizitis la Tekam-an Korea-Ĉinan Amikecan Kooperan Kultivejon, Bag Jun Gun, estro de la kultiveja administra komitato, karmemore diris al Prezidanto Hua, ke Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj vizitis ĝin en la jaro 1958 kaj de tiam ili faris ĉian klopodon por fortigi la amikecon kaj unuiĝon de la du popoloj. Kaj en la unua de oktobro de 1959 ilia kultivejo estis honore titolita kiel Tekam-a Korea-Ĉina Amikeca Koopera Kultivejo. Post tio Prezidanto Hua kaj kamaradoj Geng Biaŭ, Ĉen Muhua kaj aliaj, kune kun gvidantoj de la koreaj

Prezidanto Hua vizitas artilerian trupon de la Korea Popola Armeo.





Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim en Hamheung

partio kaj registaro, plantis en la kultivejo du pinojn, kiuj simbolas la eternan amikecon inter Koreio kaj Ĉinio.

La amikeco inter la du popoloj de Ĉinio kaj Koreio estas senprecedenca en la monda historio. Ĝuste kiel Prezidanto Hua montris: “Tiu rilato inter ni jam meritas modelon de tiuj inter la frataj partioj kaj frataj landoj.” Hodiaŭ, la du popoloj daŭre antaŭenmarŝas ŝultron ĉe ŝultro. Prezidanto Kim montris en la festeno okazigita de Prezidanto Hua: “Via ĉi-foja vizito al nia lando estas epokfara evento kiel nova brila paĝo

skribita en la kroniko de amikeco inter Koreio kaj Ĉinio.”

Antaŭ sia forpaso Prezidanto Ĝu De prikantis la amikecon inter Ĉinio kaj Koreio: “Nia rilato servas kiel ekzemplo de tiu inter la landoj, kaj niaj posteuloj nepre devas memori, ke ĝi formiĝis el sango de la du popoloj.” La ĉina kaj korea popoloj tre prizorgas la grandan amikecon kaj decidis fari ĉian klopodon por ĝin solidigi kaj disvolvi. Kiel ajn ŝanĝiĝas la monda situacio, la ĉina popolo, kiel antaŭe, nepre unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la korea popolo.



Vizito de Prezidanto Hua Guofeng al Koreio

Prezidanto Hua Guofeng salutas la bonvenigajn
amasojn akompanate de Prezidanto Kim Il Sen.





Du koreaj knabinoj prezentas florbuketojn al Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim.

(Supre dekstre) Bonvenigon al vi, Prezidanto Hua Guofeng!

Centmiloj da Pjongjang-aj popolanoj en festvestoj bonvenigas la ĉinajn gastojn.







Prezidanto Hua kaj Prezidanto Kim faras tre intiman amikecan interparoladon.

Prezidanto Hua plantas amikecan arbon en Tekam-a Korea-Ĉina Amikeca Koopera Kulturejo.



Nova Leviĝo de la Azia Kontinento

— Pri la vojo irita de Li Siguang kaj la impeto de la geologia scienco de la nova Ĉinio

IUN nokton en septembra fino de 1949, altstatura ĉino rapide ascendis, en la haveno Portsmouth de Britio, ŝipon por veturi al Francio. Li estis neniu alia ol la fame konata ĉina geologo Li Siguang.

Sed, en tiu momento, la paŝo farita de Li Siguang en la Angla Margorĝo estis neordinara paŝo, sed paŝo kiu finis lian historion de pli ol duona jarcento en la malnova Ĉinio kaj la malnova mondo. Ĝuste en tiu tempo, unu giganto, kiu altiris al si atenton de la tuta terglobo, faris en Pekino parolon skuantan ĉiujn kontinentojn: “Nia laboro estos skribita en la homan historion kaj montros: De nun stariĝis la ĉinoj konsistigantaj kvaronon de la tuta homaro.” La granda venko proklamita de Prezidanto Maŭ Zedong trarompis la orientan fronton de imperiismo kaj deklaris novan leviĝon de la azia kontinento.

En tiu memorinda tago, Li Siguang estis elektita de la nova Ĉinio kiel komitatano de la Unua Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. La ambasado de Kuomintango en Britio intencis devigi lin publikigi deklaron kontraŭ la nova Ĉinio kaj retiriĝi el la Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, sed tion li senhezite rifuzis. Tiun nokton, li sagace evitis persekutadon kaj gvatadon de Ĉiang-Kajšek-aj spionoj, forlasis sian kaŝloĝejon en ĉirkaŭurbo de Londono kaj paŝis sur la longan vojon de reveno al la patrolando.

Jam ne estis la unua fojo por Li Siguang eviti gvatadon de Ĉiang-registaro. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Li Siguang plurfoje rifuzis inviton de Ĉiang Kajšek al “fes-

teno”. Aŭtune de 1947, li veturis al Britio kun la nominala kialo ĉeesti la Internacian Geologian Kunvenon. En tiu tempo, kiam la varŝipo forlasis la marbordon, Li Siguang rigardis sian brakhorloĝon: Estis ĝuste la 12-a G.M.T. en profunda nokto. Li turnis sian rigardon al la oriento kaj, post kalkulo de la tempa diferenco inter okcidenta Eŭropo kaj Azio, ĝoje pensis en si: Estas tre bone, ke jam ruĝiĝis la oriento kaj tagiĝis en Ĉinio!

“La Tordita Azia Kontinento”

Sur la revena vojo Li Siguang skribis sian epokfaran ĉefverkon “La Tordita Azia Kontinento”.

Li ofte diris: “La naturo estas mia vasta klasĉambro por fari geologiajn eksperimentojn.” Li plej ŝatis maron kaj verkadis kutime sub la ĉielo aŭ sur ŝipo. Li ofte promenis medite sur ferdeko kaj longe pensadis pri la klimataj ŝanĝiĝoj en pratempo kaj la leĝoj de fluso kaj malfluso de maro en centmilionoj da jaroj.

Kiel la homaro konas la ŝanĝiĝojn de la terglobo — nia aĝa patrino, kiel diris Li Siguang, en la centmilionoj da jaroj? Tiu grava problemo fariĝis ripetade diskutata temo en la geologiaj rondoj de la mondo.

Eŭropaj kaj amerikaj geologoj opinias, ke la montĉenoj ĉirkaŭ Pacifiko formiĝis de falo de ĝia fundo kaj premo de ĝiaj randoj al la kontinentoj. “La Tordita Azia Kontinento” verkita de li sur la ŝipo estis refuto al la teorio elmetita de eŭropaj kaj amerikaj geologoj por klarigi, laŭ iliaj vidpunktoj, terkrustan moviĝon de Azio. Laŭ lia opinio, la tradicia eŭropa kaj amerika geologio neniel povas koni la terkrustan

strukturon de Azio kaj la koncernajn strukturojn.

Li Siguang faris, laŭ sennombraj faktoj trovitaj en observado en Ĉinio kaj aliaj mondpartoj en dekoj da jaroj, kompletan subdividon al la ĉefaj strukturaj sistemoj de la ĉina kontinento, ĝiaj maroj kaj la orientaziaj regionoj ĉe Pacifiko. La fundamentaj teorio kaj metodoj de geodinamiko kreita de li diferencas de la vidpunktoj de senmoveco kaj izoleco de la tradicia geologio. La lasta izole priskribas, laŭ vidpunkto de senmoveco, formostrukturojn kaj trajtajn karakterizaĵojn de geologiaj fenomenoj, sed geodinamiko analizas, esploras kaj malkaŝas la esencon de la geologiaj fenomenoj en movado kaj iliajn internajn rilatojn, analizas la terkrustan strukturon kaj esploras ĝiajn leĝojn laŭ la vidpunkto de movo. Laŭ serio da solidaj pruvoj Li Siguang diris en la fino de sia artikolo: “De tio venis nia konkludo: Kun rapidiĝo de la ro-

Prospektorado en montaro



tacio de la terglobo, Azio senmoviĝis, orienta Afriko kaj okcidenta Eŭropo splitiĝis kaj Ameriko postlasiĝis.” Tio estis akra provoko al aŭtoritatuloj de la tradicia geologio.

La fokuso de la akra batalo inter Li Siguang kaj la tradicia geologia skolo (poste inkluzive de la ortodoksa tektonika skolo de Sovetunio) estas kiel koni la leĝojn de terkrusta movado.

“Li Siguang Certe Revenos!”

“Trapasinte la Hindian Oceanon, la vento kaj ondoj fariĝis pli grandaj, precipe en vintro,” Li Siguang facile respondis demandon de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj pri liaj vojaĝo kaj farto. Kelkajn tagojn post kiam li atingis Pekinon, Ĉefministro Ĝoŭ venis al la Pekina Hotelo por lin vidi. Ili parolis pri la internacia situacio. Li Siguang rimarkis, ke Ĉefministro Ĝoŭ atente aŭskultis liajn impresojn pri okcidenta Eŭropo. La modesta kaj afabla sinteno de Ĉefministro Ĝoŭ plifortigis lian respekton al li. Tiu intervidiĝo multe akcelis progreson de Li Siguang en scienca kaj politika aktivado de la postaj 20 jaroj. Post lia reveno al la patrolando, kiel li diris, la terglobo rotaciis pli rapide! Iuj postĝintaĵoj estis eliminataj en movado pro reordigo (t. e. reformo).

Antaŭ ĉifoja veno al Pekino, Li Siguang jam sciis, ke li estis nomumita vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, sed tiam li ne tre volis preni sur sin tiel altan gvidan oficon. Li serioze konsideris tiun gravan komision de la ŝtato kaj timis ke li ne kapablas por ĝin plenumi. Pro tio, li venis al Pekino, laŭ lia opinio, nur por sin anonci al la patrolando kaj tuj poste estis reironta al Nankino, al la Geologia Instituto funkciigata kaj gvidata de li antaŭ kaj post la Kontraŭjapana Rezistmilito. Kiel li esperis plenenergie okupiĝi pri geologia esplorado — tio estis ĉiam aspirata de li en la malnova Ĉinio dum dekoj da jaroj!

Kamarado Ĝoŭ Enlaj intime diris al li: “En Pekino okazos tutlanda geologia konferenco. Ĝi estas prokrastita jam kvin monatojn pro vi. Iuj diris, ke Li Siguang ne revenos, do la konferenco ne estu prokrastata. Mi diris al ili, ke Li Siguang certe revenos al la patrolando! Se li nun

ankoraŭ ne alvenas, li certe renkontas, mi pensas, malfacilojn survoje. . .”

Ĉefministro Ĝoŭ diris plu al li: “Ni firme kredas, ke vi revenos! Mi diris al ili, ke la geologia konferenco estu prokrastata, nur se Li Siguang ne alvenos Pekinon. Nu, jen vi revenis! . . .”

Forta varma fluo atakis fojrefoje la koron de Li Siguang. Ne tiel forte lin skuis eĉ la vintroj ondegoj de la Hindia Oceano! Li Siguang tiam ekkonis. Kiajn kuraĝon kaj malproksimendivon pri la scienca afero la ĉinaj komunistoj havas por konstrui idealan potencon landon. Li tuj stariĝis kaj diris al Ĉefministro Ĝoŭ: “Ho, tiel estas, Ĉefministro Ĝoŭ! Mi do faros ĉion, kion la Partio komisiis al mi. Mi ĉiam obeos la ŝtaton.”

Tiamaniere komenciĝis nova ĉapitro de la scienca aktivado de Li Siguang.

Prizorgo de Prezidanto Maŭ al Geodinamiko

En 1952, kiam Prezidanto Maŭ interparolis, en iu konferenco, kun Li Siguang, li montris profundan prizorgon al geodinamiko kaj fundamentaj sciencaj teorioj. Poste Prezidanto Maŭ plurfoje akceptis Kamaradon Li Siguang kaj interparolis kun li pri astronomio, geologio, paleontologio, glacirivero, kosmogonio kaj aliaj gravaj problemoj de naturaj sciencoj.

Li Siguang spertis multajn malfacilojn en pionira laboro de scienco. En la komenco de



la dudekaj jaroj, kiam la okcidenta burĝa historiisto H. G. Wells publike deklaris en sia verko “La Skizo de Historio”, ke “Azio kaj la azia kontinento estas ankoraŭ ne esploritaj de spertaj esploristoj”, Li Siguang jam serioze enketis, sur la ĉina propra tero, karboentenantan formacion de permo-karbonio en norda Ĉinio kaj faris profundan esploradon al protozoa klando de paleontologio kaj fosilioj de *Fusulinid*-a familio de permo-karbonio. Per tio li gajnis vastan internacian reputacion. La klasifikaj normoj por *Fusulinid*-a familio difinitaj de li estas aplikataj en diversaj landoj eĉ nun. Per tiuj faktoj li refutis diskriminacion de eŭropaj kaj amerikaj historiistoj al azianoj en sciencoj kaj montris saĝon de la ĉina popolo en grava scienca prospektorado.



Kontraŭ tertremo

estis kopio de la imperiisma teorio ke “la okcidenteŭropa civilizacio moviĝis iom post iom al la Oriento”.

En la debato ĉu ekzistis glacirivero de la kvaternaro en Ĉinio, Li Siguang sola kontraŭstaris al la geologoj germana esploristo F. V. Richthofen, usona profesoro G. B. Barbour, franca pastro Teilhard de Chardin, svedaj specialisto E. Norin kaj konsilanto J. G. Andersson kaj aliaj. Ili estis fame konataj en la mondo pro “longtempa esploro” pri azia kaj ĉina geologiaj statoj, iuj el ili estis eĉ nomataj glaciriveraj specialistoj. Sed neniu el ili trovis spurojn de kvaternaraj glaciriveroj en ĉinaj internaj regionoj. Li Siguang tamen plurfoje trovis

En la internaciaj geologiaj rondoj longtempe cirkulis absurda opinio, ke en la interna regiono de Ĉinio ne estiĝis glacirivero de la kvaternaro. Usona specialisto de azia geografio George B. Cressey asertis: “En Ĉinio ne aperis glacirivero de la kvaternaro, ĉar la suda parto estis tro varma kaj la norda tro seka.” Tiu geologia profesoro mem diris, ke li “vojaĝis 100,000 anglajn mejlojn kaj vivis pli ol 20 jarojn en Azio.” Sed lia teorio ĝuste estis la vidpunkto de reakcia geografia politiko, ke la “ĉina kulturo devenis de la Okcidento”. Ĉar la okazaĵo de la kvaternara glacirivero strikte ligiĝis kun la disvolviĝo de la fruperioda homaro, tio rekte tuŝis la problemon, ĉu la azia kontinento estis devena loko de la fruperioda homaro. Tiu aserto pri neekzisto de kvaternara glacirivero en Ĉinio, ĝuste

fidindajn spurojn de kvaternaraj glaciriveroj de Ĉinio ĉe la orienta piedo de Tajhang-montaro kaj Datong-baseno en 1921, poste ĉe la montoj Luŝan kaj Huangŝan de sudorienta Ĉinio en 1933. Li sinsekve publikigis artikolojn, en kiuj li traktis fidindajn glaciriverojn de norda Ĉinio, Jangzi-rivera baseno, Luŝan kaj Huangŝan. En la monda geologia debato li fine renversis, per granda kvanto da faktoj, la erarajn konkludojn faritajn de tiuj internaciaj glaciriveraj aŭtoritatoj kaj esploristoj.

Ne estas mirige, ke resumante la batalon de nia geologia fronto, Li Siguang emfazis, ke “La politikeco en geologia scienco estas pli forta ol tiu en aliaj sciencoj”. Li plie konis, ke “kompradora intelekta kliko” en la geologiaj rondoj de nia lando fariĝis “la plej konvena kunulo”

de la pionira trupo sendita de imperiismaj landoj por fari "geografian konkeron". Li montris, ke la imperiisma "kultura agreso fariĝis ĝuste en tio mantelo por ŝirmi ĝian ekonomian agreson, kaj tiu ilia "sklaviga rimedo" "montriĝis aparte okulfrape en la geologia afero".

La batalo farita de Li Siguang pri la problemo de la kvaternara glacirivero de Ĉinio ne nur malfermis novan paĝon en esplorado de la kvaternara geologia stato de Ĉinio, sed ankaŭ klare montris, ke en disvolviĝado la ĉina scienca afero nepre devas iri sian propran vojon. Tiu problemo havas ekstreme gravan signifon por esplori klimatan evoluon, vegetalan kaj animalan variadon en la lasta periodo de Ĉinio kaj la evoluon historion de la homaro.

"Vi Bone Ludas Tajĝikjuan!"

La penetriva restumo pri la politika kaj ideologia batalo en la geologia fronto farita de Li Siguang post la reveno kaj lia trafa analizo pri la kontraŭdiroj inter la imperiismaj landoj vekis plian atenton de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Ili opiniis, ke Li Siguang estas ne nur eminenta patriota sciencisto, sed ankaŭ firma kontraŭimperiisma batalanto.

En la komenca tempo de la Unua Kvinjara Plano, Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj aliaj centraj gvidantoj demandis al Li Siguang: Kian perspektivon prezentos la natura petrolo de nia lando?

En multaj pasintaj jaroj imperiistoj kaj reviziistoj senĉese propagandis la teorion, ke "Ĉinio estas malriĉa je petrolo". Ili multfoje asertis, ke la petrolaj kampoj konataj en la mondo ĉiuj sin trovas en formacioj de mara aspekto, sed Ĉinio plejparte apartenas al formacioj de kontinenta aspekto, pro tio ĝi ne povas posedi petrolkampon valoran por industria ekspluatado. Sed Li Siguang opiniis, ke la ŝlosilo por trovi petrolon ne estas formacioj de mara aŭ kontinenta aspekto, sed tio, ĉu ekzistas kondiĉoj por estigi kaj konservi petrolon kaj kono de la leĝoj de geologia strukturo.

La historio jam pruvis: La malfeliĉo de la tradicia geologio estas tio, ke oni ne povis kompreni opinion de Li Siguang pri la petrola riĉ-

fonto de Ĉinio, elmetitan en lia lekciado farita dum eŭropa vojaĝo en 1934-1935. Li plurfoje diris en siaj lekcioj kaj verkoj, ke la neokatajaj (novĉiniaj) malleviĝaj zonoj de nia lando "entenas sedimentaĵon kun ekonomia valoro". Per "sedimentaĵo" li aludis petrolon. Ĉar Ĉinio tiam estis sub regado de Ĉiang-registaro, li ne volis klare diri al la fremdlandaj aventuristoj pri la petrola riĉfonto de nia patrolando.

Nun, la liberigita patrolando prezentis al ni la fekundan teron de 9,600,000 kvadrataj kilometroj. La geodinamiko akiris grandajn sukcesojn ne nur en ekspluatado de petrola riĉfonto, sed ankaŭ en serĉado de volframo, kromo, uranio, diamanto, karbo, raraj metaloj, kaj aliaj strategiaj riĉfontoj kaj aliaj mineralaj riĉfontoj. Eĉ kiam petrolo de Daking-olekampo ekfluis torente, la agentejo TASS ankoraŭ ripetis la aserton de "fame konataj sciencistoj" de Sovetunio, ke "Ĉinio estas malriĉa je petrolo", dirante ke "laŭ la ĝenerala geologio oni ne povas trovi petrolon en formacioj de kontinenta aspekto". En tiu tempo Li Siguang estis refoje vokita al Prezidanto Maŭ.

La tempo estis la jarfino de 1964 dum la Tria Tutlanda Popola Kongreso.

La loko estis la Pekina Salono de la Popola Halo.

Iu laboranto diris al Li Siguang: "Bonvole iru al la Pekina Salono." Li Siguang tirmalfermis la pordon, paŝis en la Pekinan Salonon kaj trovis ke Prezidanto Maŭ estas tie. Prezidanto Maŭ paŝis al li kaj, premante al li la manon, diris: "Bone vi ludas *Tajĝikjuan*, Liĉjo!" Li Siguang miris pensante, ke li ĵus eklernis *Tajĝikjuan*, kiel Prezidanto Maŭ jam sciis tion? Kaj li respondis: "Mi ne havas fortan sanon kaj ĵus eklernis *Tajĝikjuan*, sed ludas ĝin ankoraŭ ne bone."

Prezidanto Maŭ ekridis afable. Li aludis per tio, ke direktate de geodinamiko oni trovis serion da petrolaj kampoj en neokatajaj malleviĝaj zonoj (kiel antaŭvidite de Li Siguang). Prezidanto Maŭ sidiĝis en sofion kaj interparoladis kun li pri petrolo. Prezidanto Maŭ parolis pri la kunlaboro inter la Geologia Ministerio kaj la Petrolo Ministerio kaj pri la brilaj sukce-

soj de petrolaj laboristoj en ekspluatado de Daking-olekampo.

“Ĉio ĉi tio estis farita laŭ viaj instrukcioj, Prezidanto Maŭ!” diris emocie Li Siguang.

Tertremo Estas Prognozebla!

Post kiam okazis forta tertremo en Hingtaj de Hebej-provinco en 1966, Ĉefministro Ĝoŭ plurfoje kunvokis kunvenon kaj instrukciis: “Oni nepre devas trovi leĝojn pri estiĝo de tertremo kaj ĝia disvolviĝa tendenco kaj resumi spertojn.” “Oni nepre devas plifortigi la esploron pri prognozado, por ke ĝi estu preciza kaj ĝustatempa.” Li metis en la urĝan tagordon de la Ŝtata Konsilantaro la taskon rompi la teorion de nekonebleco de tertremo.

Ĉu tertremo estas konebla, prognozebla kaj preventebla? Tiu demando ja ankoraŭ ne estis solvita por iuj homoj. En tiu grava problemo, la geodinamika teorio de Li Siguang refoje alfrontis plej rigoran provon. En iu kunveno, aŭskultinte parolon de multaj kamaradoj, Ĉefministro Ĝoŭ turnis sian rigardon al Li Siguang en meditado kaj demandis: “Kian opinion vi havas pri tio, Kamarado Li Siguang?”

La lasta respondis: “Mi opinias, ke tertremo estas prognozebla. Ĝia okaziĝo ne estas hazarda, kiel ĉiu ajn alia afero, kaj havas certan procedon.” Li proponis, ke oni faru sciencan eksperimenton necesan por plenumi la taskon de prognozo de tertremo. Ĉefministro Ĝoŭ tre admiris lian certigan respondon. Li diris: “Kamarado Li Siguang sola diris malsaman opinion, ke tertremo estas prognozebla. Tiu opinio estas tre bona! En la mondo neniu afero estas nekonebla. Ni ja devas disvolvi iniciatemon por solvi malfacilan problemon de scienco. Niaj antaŭuloj postlasis al ni nur registraĵon pri tertremoj, ni devas postlasi al niaj posteuloj registraĵon pri prognozo de tertremoj!”

Kian bravecon kaj noblan spiriton la vortoj montris! De tiam Li Siguang komencis esploran laboron por prognozi tertremon. Ĉu en vento, pluvado, neĝado aŭ profunda nokto, tiu preskaŭ 80-jara komunisto, kiu partianiĝis antaŭ sia sepdek-jara aĝo, persone iris al la fronto de batalo.

Liaj esploroj pri tertrema geologio kondukis geodinamikon en novan terenon.

En la historio de tertrema prognozo de nia lando estis jena sceno: Post la tertremo de 1967 en Hegian-gubernio de Hebej-provinco, Li Siguang ricevis en profunda nokto telefonon de la Ŝtata Konsilantaro, por ke li ĉeestu urĝan kunvenon. Kiam li atingis la kunvenejon, estis jam la dua matene. Ĉefministro Ĝoŭ prezidis la kunvenon. Koncerna institucio raportis al la Ŝtata Konsilantaro, ke okazos 7-gradita tertremo en Pekino je la sepa matene de tiu tago, kaj postulis de la Ŝtata Konsilantaro permeson ke ili tuj sciigu tion al la pekinaj loĝantoj ke ili fuĝu el la domoj. En la kunveno oni diris diversajn opiniojn. Poste, Ĉefministro Ĝoŭ demandis al Li Siguang: “Diru ĉu la stato vere estas tiel danĝera?”

Antaŭ ol diri sian opinion li iris al telefono, rapide telefonis al la observaj stacioj de terkrusta premo starigitaj de li laŭ geodinamika teorio kaj aŭskultis ilian detalan raporton pri la stabileco kaj anormaleco de terkrusta premo en la lastaj tagoj. Post kiam li ricevis respondon pri “senanormaleco”, li revenis al sia sidloko en la kunveno. Tiam restis tre malmulta tempo por li konsideri. Sed, posedinte necesajn fidindajn donitaĵojn kaj farinte streĉan pripenson kaj rapidan prijuĝon laŭ la geologia strukturo de la pekina regiono, li klare diris: “Ne ekzistas tia danĝero.” Kaj li proponis, ke oni ne surprizu la pekinajn loĝantojn per alarmo, kaj diris al Ĉefministro Ĝoŭ: “Bonvolu diri al Prezidanto Maŭ, ke li ripozu trankvile!”

Ĉefministro Ĝoŭ akceptis lian proponon, sed maldormis tiunokte. Por la sekureco de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉefurbaj loĝantoj, li restis en sia oficĉambro de la Ŝtata Konsilantaro por trakti ian neatenditan okazaĵon, ĝis kiam la tagiĝo kviete alvenis kaj la ruĝa suno leviĝis en la ĉielon de Pekino. . . La ĝusteco de la prijuĝo de Li Siguang estis pruvita.

“Ĉu Vi Aŭdis?”

Frumatene de la 28-a de aprilo 1971, deĵoranto de la oficejo de Ĉefministro Ĝoŭ ricevis tele-

fonan raporton, ke la malsano de Li Siguang graviĝis kaj lia vivo estas en danĝero. Ĉefministro Ĝoŭ, kiu kutimis labori nokte, ĵus enlitiĝis kaj endormiĝis post preno de dormigilo. Vekite de la dejoranto, Ĉefministro Ĝoŭ tuj sendis siajn du kuracistojn al Li Siguang. Sed por la paciento, kiu longe kaj serioze suferis de pluraj malsanoj kaj ricevis multan prizorgon de la ŝtato kaj la partia organizo, ĉiaj fidindaj kuracmetodoj pruviĝis senefikaj post la kreviĝo de lia arteria tumor.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam kuracistoj konfirmis ke li suferas arterian tumoron, li jam sciis, ke li vivos ne longe. Por sekureco de la Pekina kaj Tiangin-a regiono, li iris, en risko de probable rompiĝo de la tumor en ĉiu ajn momento, al gubernioj ĉirkaŭ Pekino por akceli la prognozan laboron pri tertremo. Krome li ankaŭ intensigis la esploron pri oceana geologio kaj ekspluatan laboron de subtera termo.

Eĉ en la lasta tago de sia vivo Li Siguang sincere petis la kuraciston: "Doktoro, malkaŝe diru al mi, kiom da tempo mi ankoraŭ povas vivi? Mi ankoraŭ ne plenumis la taskon de tertrema prognozo al mi asignitan de Ĉefministro Ĝoŭ. . ." Li refoje parolis pri tertrema laboro kun sia sekretario tutan posttagmezon. Li diris al la lasta, ke li portu al la hospitalo grandan ĉinan mapon en la sekvinta mateno, ĉar li intencis aranĝi laborojn pri tertrema prognozo. . .

Sed Li Siguang ne povis vidi la mapon alportitan de la sekretario. La kreviĝo de lia arteria tumoro ĉesigis lian longan marŝon en scienco. Kamarado Li Siguang, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, forpasis je sia 82-jara aĝo.

"Mi iris zigzagan vojon dum mia tuta vivo, finfine mi trovis mian esperon en la Komunista Partio!" Tio estis lia resumo pri lia irita vojo. En Li Siguang oni povas vidi brilan figuron de ĉina sciencisto en grimpado de montpintoj de scienco!

La 2-an de majo de 1971, nia estimata Ĉefministro Ĝoŭ, prezidanto de la Ĉina Akademio de

Sciencoj Guo Moĵuo kaj aliaj gvidaj kamaradoj partoprenis en la kunveno por funebri Kamaradon Li Siguang.

Estis pluva tago. La ĉeestantoj klare vidis, ke pluveroj malsekigadis la blankan hararon de Ĉefministro Ĝoŭ. Li ne portis ĉapon. Intime ĉirkaŭrigadante la subĉiele starantajn geologiajn laborantojn kun nigra rubando sur la brako li diris kun iom raŭka basa voĉo:

"Nun mi donas la taskon al vi! En la funebra kunveno mi ĵus citis la vortojn de Kamarado Li Siguang diritajn dum lia vivo. Li diris, ke li havas tre grandan memfidon pri tertrema prognozo. Tio ne nur koncernas la problemon kuratingi avangardan nivelon de la mondo, sed ankaŭ sekurigon de la vivo kaj posedaĵo de la popolo. Vi nepre devas daŭrigi la laborojn postlasitajn de Kamarado Li Siguang! Ordigu kaj lernu liajn verkojn. Ĉu vi aŭdis?"

"Jes!" firme respondis la starantoj.

Ĉefministro Ĝoŭ, kun firma tono de komandanto, refoje demandis: "Vi nepre daŭrigu la laborojn de Li Siguang, ĉu vi aŭdis? Ĉu vi aŭdis?"

"Ni aŭdis!" unuvoĉe respondis la ĉeestantoj en kaj ekster la funebra kunvenejo. La respondo superis tondradon.

La demandon de Ĉefministro Ĝoŭ respondis ne nur tiuj reprezentantoj de la geologia fronto! Ĉiuj, kiuj laboras sur kampoj, en arbaroj, ĉe riveroj, en laboratorioj, sciencaj institutoj, laborejoj, klasĉambroj kaj ĉe komputeroj, respondas la postulojn de la patrolando kaj plenumas la komisionojn de la Partio — la deziron de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ dum ilia vivo efektiviĝi modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko.

"Ĉu vi aŭdis? ĉu vi ĉiuj aŭdis?"

"Ni aŭdis, ni ĉiuj aŭdis."

Tio estas potenca voĉo de la nova leviĝo de la azia kontinento! Tio montris ke aperos granda impeto en Ĉinio! Ĝi anoncis, ke en la mondo nepre aperos ĉina nacio kun altnivelaj sciencoj kaj kulturo kaj nova potenca socialisma Ĉinio!

HE HUANGBIAŬ:

Inĝenierad-termofizikisto

Vu Ĝonghua



Vu Ĝonghua

EN vintro de 1950, iu ĉina junulo suriris la podion de la kunveno okazigita de la Usona Societo de Mekanikaj Inĝenieroj en Novjorko kaj legis sian disertaĵon «Teorio pri Tridimensia Subsona kaj Supersona Fluo en Turbinoj».

La disertaĵo profunde impresis la ĉeestantajn sciencistojn kaj aliajn aŭskultantojn. Iuj admiris lin, ke li elmetis novan metodon por trakti la internan laborprocedon de reaktoro, kaj aliaj ĝojis pro tio, ke li kreis novan fundamentan teorion pri projektado de progresintaj jetreaktoroj por la mondo.

Kun rapida disvolviĝo de moderna tekniko, tiu teorio ricevis altan takson en la mondo kaj fariĝis la teoria bazo de projektado kaj analizo de modernaj turbinoj. En 1976, la Tria Internacia Jet-reaktora Konferenco nomis en sia resumo lian teorion «klasika teorio». Nun tiu teorio estas aplikata de multaj landoj en projektado de reaktoroj de avangardaj aviadiloj.

La nomita junulo estis neniu alia ol Profesoro Vu Ĝonghua, kiu estas nun reprezentanto de

nia Kvina Tutlanda Popola Kongreso kaj vicdirektoro de la Mekanika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

I

Kiam Vu Ĝonghua lernis en mezlernejo, eksplodis je la 18-a de septembro 1931, la agresiva milito farita de la japana imperiismo kontraŭ Ĉinio, kaj poste okazis Lugoŭkiaŭ-evento. Fronte al la tragika realeco, ke la ĉina popolo suferis agresadon, li decidis studi mekanikan inĝenieradon por kontribui sian forton en konstruado kaj potencigo de la patrujo, por ke ĝi ne plu suferu imperiisman tiranadon.

Vu Ĝonghua sukcese trapasis la ekzamenon por studi en Usono kiel stipendiulo de Kinghua-universitato. En 1944, li kaj lia edzino Li Minhua daŭrigis sian studadon en iu usona universitato kaj ricevis la titolon de doktoro respektive en tri kaj kvar jaroj.

Post la diplomiĝo ili tre deziris reveni al sia patrujo, sed ili devis resti provizore en Usono pro tio, ke tiam arde iris en Ĉinio la Liberiga

Milito, kaj krome, ili ne volis veni al la mal-luma regiono regata de Kuomintango. Ili iris labori en iu usona aviada instituto.

Tiam en la mondo ĵus aperis nova progresinta jet-reaktoro. Tiu motoro ludas tre gravan rolon en la nacidefendo kaj la nacia ekonomio. Sed, la "teorio pri du-dimensia fluo" tiam jam aperinta kontentigis nur la bezonon por projekti malpli progresintan reaktoron. Por pli progresinta jet-reaktoro estis bezonata nova "teorio pri tri-dimensia fluo". Tiun malfacilan taskon ne solveblan por multaj sciencistoj en la mondo la instituto komisiis al Vu Ĝonghua.

Komenciĝis la penema esplorado de Vu Ĝonghua. Kiam li proksimiĝis al la alta pinto de la teorio pri reaktora termofiziko, li vidis, ke la mistera altaĵo estas kvazaŭ kovrata de nuboj.

"Por diligentuloj ne estas problemo nesolvebla!" "La objektivaj leĝoj ja estas koneblaj!" Li ofte kuraĝigis sin per tiuj vortoj. Li tagnokte kaj sinforĝese studis librojn pri termodinamiko, pneŭmatiko, aplikata matematiko kaj aliaj natursciencoj. Li studis grandan nombron da eksperimentaj raportoj kaj projektaj metodoj pri gas-turbinoj de diversaj landoj de la mondo kaj faris fundamentan analizadon de laborprocedo interne de reaktoro aplikante la fundamentan leĝon de fiziko.

La sezonoj alternis. Vu Ĝonghua ofte ŝvitegis kaj kapturiniĝis pro longa peniga laborado. Foje li subite eksuferis de duodena ulcero kaj multe sangis. Pensante, ke li estas ĉino, li pleniĝis de memfido kaj forto. Tuj post kiam li elhospitaliĝis, li, kvankam malforta, jam sin ĵetis en studadon de la teorio. Dank' al trijara klopodado li fine fariĝis kreinto de tiu teorio.

II

"Ni studas eksterlande por konstrui nian patrujon", tio estis neŝanceblebla patriota decido de la geedzoj de Vu Ĝonghua.

Sekve de la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 por ĉiam forpasis la epoko, en kiu la ĉina nacio estis tretata. Kiam li aŭskultis, kiel observanto, la firmajn kaj justajn voĉojn de la delegito de la nova Ĉinio dum diskutado pri la korea pro-

blemo en la Konsilio de Sekureco de UNO, li sentis sin kvazaŭ puŝita de lavanga forto. Li kortuŝiĝis kaj pleniĝis de fiero kaj ĝojo. Li decidis frue reveni al sia patrujo.

En la 1-a de aŭgusto, 1955, Profesoro Vu Ĝonghua ascendis aviadilon kune kun sia familio por flugi al la patrujo.

Apenaŭ li surpaŝis la teritorion de la patrujo, li vidis, ke ĉie regas prospereco: vikle iras la socialismaj revolucio kaj konstruado, amase aperas novaj aferoj, energie laboras milionoj da popolanoj. . . . En bankedo okazigita nelonge post lia reveno, nia estimata Ĉefministro Ĝou Enlaj firme manpremis kun la geedzoj de Vu Ĝonghua, pridemandis multajn aferojn kaj kore kuraĝigis ilin, dirante: "Vi estas ankoraŭ junaj. Mi esperas, ke vi multe kontribuos por nia lando."

Ĉio ĉi tio forte tuŝis lian koron! Li komprenis la veran signifon de sia estonta laboro. Li decidis dediĉi sian tutan energion al la patrujo.

En 1956, Profesoro Vu Ĝonghua entuziasmo-plene partoprenis en ellaborado de scienca plano de nia lando. Li proponis, ke nia lando faru esploradon pri inĝenierad-termofiziko kaj disvolvu gas-turbinan aferon. Liaj proponoj estis metitaj en la planon. Post la sankcio de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio pri la plano, li plenenergie sin ĵetis en la fundamentan esploran laboron de inĝenierad-termofiziko difinita en la plano.

Kiel sciencisto, Vu Ĝonghua bone konis la gravecon de kulturado de sciencaj laborantoj. Kiam li laboris kiel vicdekano de la Dinamika Fakultato de Kinghua-universitato, li fondis la unuan fakon de gas-turbino por kulturaj esplorantoj de tiu branĉo por la nova Ĉinio. Li tagnokte kaj senlace kompilis instruajn materialojn kun propraj karakteroj kaj persone faris lekciadon. Nun tiuj junaj laborantoj elkulturitaj de li estas en sana kreskado.

Por disvolvi sciencon esploradon la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Kinghua-universitato kune starigis en 1956 dinamikan esplor-sekcion kun Vu Ĝonghua kiel ĝia direktoro. Sub direkto de Maŭzedongpenso li vizitis fabrikojn kaj pre-

nis ilin kiel vastan eksperimentejon, kie li atingis multajn sukcesojn en sia scienca esplorado.

En 1956, li publikigis sian artikolon "Projekto pri Turbinaj Padeloj sur Arbitra Surfaco de Turniĝo" sur la bulteno de mekanika inĝenierado, kiu vekis grandan intereson de multaj ali-landaj sciencistoj. En 1957, Vu Ĝonghua kompilis «Tabelojn de la Termo-dinamikaj Proprecoj de la Produktoj de Bruliĝo de Hidrokarbono en Aero» kaj ĝia anglalingva eldono ricevis internacian atenton. En 1958, kiam nia lando komencis produkti siajn komputerojn, li aktive kunlaboris kun la Kalkulmaŝina Instituto por kompili la unuan komputeran programon de nia lando por turbinaj kalkuladoj, kaj nun tiu atingo jam estas aplikata de multaj sciencaj unuoj kaj fabrikoj.

Ĝuste en 1958, la jaro de la Granda Impeto, Prezidanto Maŭ rigardis la atingojn de dinamika esplorado montritajn en la Ekspozicio de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li firme man-premis kun Prezidanto Maŭ kaj pleniĝis de feliĉa sento kaj forto.

Tuj poste li faris rigoran derivadon de la tri-dimensia movado de glueca fluo rilate al la turniĝantaj padeloj en turbinoj kaj per tio korektis iujn erarojn en fremdlandaj lernolibroj kaj era-rajn ekvaciojn kaj konkludojn en fakaj libroj.

Li tamen ne kontentiĝis pri siaj atingoj. Por plie altigi la kvaliton de gas-turbinoj li komencis labori super solvado de la tri-dimensiaj fluaj ekvacioj per arbitraj ne-ortangulaj kurbliniaj koordinatoj kaj respondaj ne-ortangulaj elemen-toj de rapideco. Ĝuste tiam komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio.

III

Vu Ĝonghua estis volvita en tiun grandan re-
volucian fluon kaj provita en ĝi. Samtempe li
profundiĝis en fabrikojn por fari esploron.

Sed, Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando"
levis herezan venton de ruinigo de sciencoj kaj
nuligo de studado pri aviada teorio. Iu postu-
lis, ke li rezignu esploron de la teorio pri
aviadila reaktoro kaj sin okupu per alia pro-
fesio. Li tre indigniĝis pro tio. "Prezidanto

Maŭ kaj Ĉefministro Ĝou metis grandan atenton
sur aviadon! La Partio kaj la popolo bezonas
fortan nacidefendon! Iu ajn faro por neniigi
la aviadan esploron ne konformas al la re-
volucia linio de Prezidanto Maŭ!" Pensante
tion li firme diris al tiu homo: "Ne, mi ne for-
lasos mian aferon!" Poste la esploraj laborantoj,
kiuj studis la teorion kune kun li, estis trans-
postenigitaj unu post alia, kaj fine restis li sola
en tiu esplorado.

Fronte al tiu granda premo li ricevis entuzias-
man subtenon de maljunaj kadroj, kiuj firme
plenumis la revolucion linion de Prezidanto
Maŭ, subtenon de sciencaj laborantoj kaj sub-
tenon de laboristoj. Informiĝinte pri lia mal-
facileco, laboristoj de iu malproksima fabriko
etendis sian varman manon al li: "Ni laborista
klaso bezonas tiajn specialistojn kiel Vu Ĝong-
hua. Se estas malfacile por li labori tie, do li
venu al ni!"

Ĝuste tiam, en iu labora kunveno Vu Ĝong-
hua aŭskultis la gravan instrukcion de Ĉefmi-
nistro Ĝou pri plifortigo de la esplora laboro
de aviadila reaktoro. La prizorgo de la Partio
kaj subteno de la vastaj popolamasoj kaj kadroj
donis al Vu Ĝonghua senliman forton por daŭ-
rigi la laboron.

Por altigi nian aviadan nivelon li plurfoje
vizitis iun fabrikon en la Nordoriento dum
fresta vintro malgraŭ ke li suferis de hiper-
tensio. Matene, en la temperaturo de pli ol 20
gradoj C sub la nulo li iris al laborejo por es-
plori novtipan aviadilan reaktoron kune kun
teknikistoj kaj laboristoj. Nokte li kun okulvi-
troj ripetade faris kalkuladon kaj kontroladon
per komputero. Post penema klopodado li kreis
novan komputeran programon. Vidante, ke li
laboris tiel diligente kaj sinforĝese, gvidantoj
kaj laboristoj de la fabriko maltrankviliĝis pro
lia sano. Sed li diris ridetante: "Nenio alia
pli gravas por mi ol elfari reaktoron."

"La laboro devas progresi pli rapide!" "Tempo
ja estas vivo!" En la pasintaj jaroj Vu Ĝong-
hua prenis la oficejon kiel sian hejmon. Post
deĵora horo kiam aliaj revenis hejmen, en lia
laborĉambro tamen ankoraŭ brilis lamplumo.

Eĉ en la festtagoj kaj ferioj li ofte iris al la instituto por labori. En 1976, la 59-jara Vu Ĝonghua ĉeestis la Trian Internacian Jet-reaktoran Konferencon okazigitan en okcidenta Germanio. Kiam li finis en ĝi sian legadon de la disertaĵo «Solvo de Tri-dimensiaj Flujaj Ekvaĵoj per Arbitraj Ne-ortangulaj Kurb-liniaj Koordinatoj kaj Respondaj Ne-ortangulaj Elementoj de Rapideco», eksplodis varma mankla-



Huang Tongnian

ANTAŬ nelonge, respondeculoj de la Ĉina Komisiono de Scienco kaj Tekniko kaj multaj famaj sciencistoj rigardis neordinaran teknikan demonstradon.

Inĝeniero Huang Tongnian ekpemis ruĝan butonon de la hele flava dentrada mezurilo, kaj la kolona dentrado sur ĝi komencis rapidege turniĝi por esti mezurata. Sur la hele verda registra paperslipo tuj desegniĝis ruĝa kurbo, la komputero tiktakadis kaj baldaŭ finis sian kalkulon pri la eraro montrita de la ruĝa kurbo kaj fintaĵpis la rezulton. La mezurado estis plenumita en nur iom pli ol unu minuto.

kado. La konferenco alte taksis lian disertaĵon. Oni diris, ke lia disertaĵo estas “grava disvolviĝo” de lia antaŭa teorio kaj “tajdo de la konferenco”, kaj “traktado de tiu komplika problemo povas esti elmetita nur de la kreinto de tiu teorio”.

Hodiaŭ, Profesoro Vu Ĝonghua kun pli granda entuziasmo komencis novan longan marŝon por atingi novan scian pinton.

Kreado de Dentrada Mezurilo

de LONG HU

Dentrado ja troviĝas sur ĉiu ajn ordinara maŝino, tamen estas malfacile mezuri precize la normecon de dentradoj. Kompleksa estas la geometria figuro de dentrado. Por mezuri la formon, la distancon inter malsamaj punktoj, la dikecon ktp. de unu dentrado, 6 aŭ 7 malsamaj aparatoj kaj pluraj horoj estas bezonataj, kaj eĉ tia mezurado ne povas ĝuste montri plene la eraron de dentrado.

De pli ol 40 jaroj, eksterlandanoj klopodadis por krei aparaton por rapide kaj precize mezuri la tutan eraron kaj eltrovi la kaŭzon de ĝia estiĝo en produktado. Kaj tiu malfacila problemo estas solvita de Huang Tongnian.

Antaŭe, Huang Tongnian okupiĝis pri esplorado de boriloj kaj akiris rimarkindan sukceson en esploro pri nova teknologio de borilo. En 1957, kiam en la fabriko kie li laboris ankoraŭ troviĝis soveta specialisto, li laboris kiel lia asistanto. Foje li kaj liaj kolegoj en projekta grupo trovis eraron en desegnaĵo farita de la specialisto kaj ili korektis ĝin, ĉar alie maŝino farita laŭ ĝi ne povus funkcii. Informiĝinte pri tio, la specialisto eksplodis de kolero anstataŭ rekoni sian eraron. De tiam Huang Tongnian ne plu laboris kiel lia asistanto kaj komencis fari esploron pri mezurilo de dentradoj.

Kun forta deziro rapidege disvolvi la sciencan aferon de la patrolando, Huang Tongnian plene sin dediĉis al la nova esplorado. Ĉiutage li dronis en studo de desegnaĵoj, kurboj kaj ciferoj. Pro senĉesa cerbumado, li foje kaj foje forgesis preni manĝon, ripozi kaj eltrolebusiĝi ĉe celloko. En multaj tagoj de tiu periodo, li cerbumadis, desegnadis kaj kalkuladis ĉe sia skribotablo en la oficejo kaj rimarkis la forpason de tempo nur je subita sonoro de la deĵorfina signalo, bedaŭrante ke la labortempo estas tro mallonga. En multaj noktoj, li laboradis sola ĉe la tablo ĝis apero de matenruĝo en la oriento.

Dum eksperimentado, li kaj aliaj kamaradoj de la eksperimenta grupo iris en la fabrikon en profunda nokto por fari mezuradon en kvieta medio sen skuado de maŝinoj, kiu povus malprecizigi la mezuradon.

En sia laboro, Huang Tongnian ricevis subtenon kaj helpon de centoj da laboristoj kaj teknikistoj de la Ĉengdu-a Instituto de Instrumentoj kaj aliaj pli ol 30 unuoj. Kune kun Huang Tongnian ili laboris energie por rapide elfari ŝlosilajn maŝinpartojn kaj mezurilojn kaj elmetis multajn postulojn kaj proponojn. Ilia riĉa sperto metis solidan bazon por la esplora laboro de Huang Tongnian.

Huang Tongnian laboris kaj vivis kune kun laboristoj, faris centfoje mezuradojn kaj pruvojn, fine konis la kaŭzojn kaj leĝon de apero de eraroj en produktado de dentradoj kaj pretigis gravan sciencan donitaĵon por plibonigi la produktadon de dentradoj.



Haŭ Gianhiu en 1951

HAŬ Gianhiu, nun 43-jara, estis fame konata labormodelo en la tekstila industrio de nia lando en la kvindekaj jaroj. En la fino de 1977 ŝi estis nomumita kiel vicministro de la Ministerio de la Tekstila Industrio. Mezastatura Haŭ Gianhiu kun mallonge tonditaj haroj ĝoje diris: “Estis neimageble en la pasinteco, ke mi, malriĉa knabino, kiu preskaŭ mortis de malsato en la malnova socio, hodiaŭ povas partopreni en administrado de la ŝtato.” Ŝi esprimis, ke kvankam ŝi laboras sur la gvida posteno, sed ŝi ne disiĝos disde la laboristaro.

Post kiam Kingdaŭ liberiĝis en 1949, Haŭ Gianhiu fariĝis laboristino de la unua generacio de la nova Ĉinio en la Sesa Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de la urbo. En laboro ŝi modeste lernis de aliaj, diligente studis teknikon kaj lerte unuigis la vastajn popolamasojn. Dank’ al sia klopodo, ŝi posedis laborprocedon, teknologion kaj manipuladon de maŝino por maldikaj fadejoj kaj kreis kompletan da maŝinmanipula metodo en malpli ol du jaroj. Poste, la koncernaj teknikistoj de la Ministerio de la Tekstila Industrio kaj la Tutlanda Tekstila Sindikato resumis la metodon en la faman “Labormetodon de Haŭ Gianhiu”. Disvastigo de tiu metodo ludis gravan rolon en pliprodukto de ŝpintek-

Antaŭe Ŝpinteksistino, nun Vicministrino

de HIN HUA

sajo, ŝparo de krudmaterialo, malmultigo de produktokosto kaj altigo de produktiveco en la tekstila industrio de nia lando.

Haŭ Gianhiu diris, ke ŝi faris nur tion, kion ŝi devis fari, tamen la Partio kaj la popolo donis al ŝi grandan honoron elekti ŝin kiel modelan membron de la Komunisma Junulara Ligo kaj tutlandan labormodelon de la industria fronto.

Ŝi rememoris la feliĉajn akceptojn de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ al ŝi. En 1951,

kiam ŝi kreis la nomitan labormetodon, ŝi estis invitita al Pekino por partopreni en la celebra aktivado de la Nacia Festo. En la grandioza nacifesta festeno ŝi, en la nomo de ĉiuj ĉeestantaj laboristoj, tostis al Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ kapjesis kun rideto, prenis la glason da vino prezentitan de ŝi kaj eltrinkis per unu tiro. Poste li sin klininte demandis ŝian nomon. Kiam Ĉefministro Ĝoŭ diris, ke ŝi estas Haŭ Gianhiu, Prezidanto Maŭ firme premis ŝian manon kaj intime pridemandis produkton de ŝia



Fabrikestrino Haŭ Gianhiu kaj laboristinoj kune solvis teknikan problemon en 1970.



Haŭ Giankiu en la tutlanda kunsido de labormodeloj en 1978

fabriko. Li kuraĝigis ŝin, dirante, ke ŝi lernu bone kaj laboru diligente. Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ ankoraŭ subskribis sur ŝia notlibro. Poste, Prezidanto Maŭ plurfoje akceptis Haŭ Gianhiu. Ŝi diris, ke ĉiu akcepto de Prezidanto Maŭ donis al ŝi grandan kuraĝon por antaŭenmarŝo kaj forton por servo al la popolo.

En 1953, la partia organizo de la fabriko sendis ŝin al Pekino por ke ŝi lernu en la Laborista-Kampana Mezlernejo sub la Ĉina Popola Universitato, kaj poste, ŝi daŭrigis sian lernadon en la Orientĉinia Tekstila Instituto de Ŝanhajo. En 1962, ŝi finis sian lernadon kaj revenis al sia fabriko kaj laboris kiel teknikistino. En 1965, ŝi funkciis kiel vicestrino de la Kingdaŭ-a Oka Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko.

Haŭ Gianhiu ofte rakontis sian suferplanan infanecon al la fratinoj.

Ŝi devenis de malriĉa familio. Antaŭ la Liberiĝo, ŝia patro servis kiel ĉevalĉaristo kaj ne

povis vivteni la tutan familion kun 8 membroj per sia laboro. Kiam Haŭ Gianhiu aĝis 9 jarojn, ŝi provis iri al ŝpinteksa fabriko por labori kiel infanlaboristino. Ŝi vizitis preskaŭ ĉiujn ŝpinteksajn fabrikojn de Kingdaŭ, sed neniu el ili akceptis ŝin.

Post la Liberiĝo, ŝi eniris la ŝpinteksan fabrikon kune kun multaj malriĉaj fratinoj. Komence, ĉio en la fabriko forte ŝin interesis. Ekzemple, la malnova sistemo estis frakasita, la feŭdaj laborĉefoj kun vipo en mano estis faligitaj kaj ankaŭ la malnova regularo por priserĉi la korpon ĉe elirejo de la fabriko estis abolita. La laboristoj partoprenis en administrado de la fabriko kaj fariĝis ĝiaj mastroj.

Ili laboris plenenergie kaj novaj eltrovoj kaj raciaj proponoj prezentiĝis unu post alia. La popola registaro publikigis regularon pri labora protektado, starigis postlaboran lernejon por oficistoj kaj laboristoj kaj konstruigis loĝdomojn de laboristoj, infanĝardenojn kaj infanvartejojn. La laboristaro vere fariĝis mastro de la ŝtato.

Haŭ Gianhiu amas sian fabrikon kaj tekstilan industrion. Post kiam ŝi fariĝis vicestrino de la Oka Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko, ŝi ofte faris fizikan laboron kaj gvidis la oficistojn kaj laboristojn en disvolvo de la amasa movado de lerno de Daking. Post multfoja eksperimentado ŝi kune kun aliaj laboristoj sukcese uzis la alguon anstataŭ amelon de greno en amelado de fadenoj. Dank' al tio, la fabriko ĉiujare ŝparis kelkcent mil kilogramojn da greno.

Haŭ Gianhiu estis elektita kiel membro de la Dekunua Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

La edzo de Haŭ Gianhiu estas kuracisto. Ili havas du infanojn: la filino estas dekjara kaj ŝatas danci kaj la filo estas okjara kaj ŝatas pentri. Ili sane kreskas en la nova Ĉinio.

Pri Nuntempa Instruado de Matematiko

— Respondo al hispana esperantisto

Hispana esperantisto S-ro Antonio Alonso Nunez skribis al ĉina esperantisto K-do Hujucz pri matematika instruado kaj volis informiĝi pri la opinioj de ĉinaj matematikistoj. Por tio K-do Hujucz sin turnis al K-do Ĉen Gingjun, esploranto de la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Poste K-do Hujucz komisiis nian redakcion fari la respondon. Ĉi-sube estas la ĉefa enhavo de la tri leteroj.*

La Red.

S-ro Hujucz, Pekino, Ĉinio

31-8-1977

Estimata samideano,

Mi havas la plezuron skribi al vi en via kvalito de Prezidanto de ĈEL, kun anticipa danko al via bonvola helpo.

Mi estas licenciulo pri matematiko, kiu partoprenos en diskuto okazonta en mia urba universitato ĉirkaŭ la fino de venonta oktobro. Ĝuste por tiu diskuto estos bonvenaj viaj sciigoj. La temo de la diskuto: niatempa instruado de matematiko.

Unue, mi prezentu al vi kelkajn specimenaĵojn:

Usona verkisto Morris Kline verkis libron "Why Johnny can't add: the failure of the new math", kies hispanlingva traduko ricevis eĉ pli drastan titolon: "La fiasko de la moderna matematiko". Nu, ĉu, se diskutinde, temus pri moderna matematiko, aŭ pri moderna instruado de matematiko?

Ĉu oni rajtas diri al 9-jaraj geknaboj ke "giro estas la produkto de du aksaj simetrioj, kies aksoj havas komunan, nevariantan punkton"? Ĉu oni rajtas nomi "matematika esplorado" jenan prezenton: "Ni difinu en $N \times N$ jenan rilaton . . . Vi pruvu ke temas pri ekvivalento-

rilato. Poste, ĉe $(N \times N) \times (N \times N)$ ni difinu jenajn aplikojn en $(N \times N)$. . . Vi pruvu ke temas pri bonaj difinoj, ke temas pri operacioj komutecaj, ktp.

Analoge: veni al la Cramer-a regulo tra tenzoroj (ŝajne, eĉ ie veni al plej granda komuna dividanto tra funktoj). Aŭ por solvo de problemoj, kiaj "Se unu libro kostas 325 pesetojn, kiom kostus 17 libroj?", oni bezonas du paĝojn da aplikoj, liniaj funkcioj, ktp.

Ĉe pli alta nivelo: ĉu estas racie ke tra la tuta studado de licencio en nia universitato eĉ ne unufoje oni mencias intuiciismon? ĉu oni devas akcepti jenan pruvon por la Taylor-a regulo: "Temu pri funkcio plenumanta jenajn kondiĉojn. . . Tiukaze, validas jena rezulto . . . (Taylor). Eĉ validas jena pli forta rezulto. . . Kaj ni tion pruvos per jena helpa funkcio, kiun ni konstruas precize por tiu celo. . ."? — ĉu tio estas matematika studo, ĉu ricevo de helpo de ia Dio, ĉu bonvenaĵo por rapide veni al la celo?

Analoge: "Se ni pruvos ke la gamma-funkcio ekzistas ankaŭ en la kompleksa kampo, kial ni ne kalkulas $\Gamma(i)$?" — "kial ni scias mezuri nenion per Lebesgue-a mezuro?" (Evidente, temas pri demandoj en nia universitato).

Opinioj kaj sintenoj svarmas ĉe ni: "La 'sistemo' ('establishment') volas nin frenezigi"; "Male, temas pri tio, ke ne ĉiuj mensoj kapablas elteni la streĉojn trudatajn de progreso. . . do, ke ili rezignu studadi matematikon", ktp., ktp.

* Ĉen Gingjun estas fama ĉina matematikisto, kiu atingis mondan nivelon en studo de Goldbach-konjekto.

Nu, mi ŝatus prezenti en la diskuto informojn pri la stato de la afero en pluraj landoj. Pri Francio, Usono, k. a., mi jam havas informojn. Jen, do, la sciigoj kiujn mi kuraĝas peti de vi: (Se vi ne kompetentas pri tiu temo, mi tre, tre dankus, ke vi serĉu informojn pere de viaj konatoj, ktp.):

Ĉu en via lando la afero statas same, aŭ aliel? Ĉu okazas samaj aŭ analogaj diskutoj? Ĉu ili okazis jam antaŭ longa tempo? Kiaj estas viaj personaj opinioj? ktp.

Mi ree dankas vin en anticipo, pro via valora helpo.

Se vi deziras ke pri viaj sciigoj mi faru limigitan uzon (ekz., ke mi ne menciuj vian nomon, ktp), bonvolu informi min pri tio. Ĉe konfirmo de ricevo de via informo, mi sendos ankaŭ informeton pri la diskuto.


Kun elkora saluto, mi restas samideane via,

Antonio Alonso Nunez,
La Rosa, 26-5^o-C, Santiago
de Compostela Hispanio

Estimata majstro Hu,

Via letero datita de la 17-a de oktobro estas ricevita de mi. Pri la demandoj elmetitaj de hispana licenciulo Antonio Alonso Nunez mi esprimis jenajn opiniojn por referenco.

1. Ne estas konvene diri al 9-jaraj geknaboj, ke "Giro estas la produto de du aksaj simetrioj kies aksoj havas komunan, nevariantan punkton". Estas pli bone diri al ili, ke "Se la punkto A sur ebena moviĝas ĉiam sam-distance de la difinita punkto O, tiam la kurba linio desegnita per la punkto A estas nomata cirklo".



2. Por solvi tiajn problemojn kiaj "Se unu libro kostas 325 pesetojn, kiom kostus 17 libroj?" estas pli bone apliki rekte la multiplikon, t. e., $325 \times 17 = 5525$.

3. Intuiciismo estas grava en instruado, sed tre grava estas ankaŭ la kapablo de abstrakta rezono. En la pasinta periodo en nia lando oni pli ofte aplikis intuiciismon en la instruado de matematiko kaj emfazis la praktikan valoron, donante malpli da instruado pri teorio, kaj ankaŭ la trejnado pri fleksebleco ŝajne malpliigis.

.....

Kun saluto, via lernante

Ĉen Gingjun
la 2-an de januaro 1978.

Al la Redakcio de El Popola Ĉinio

Tre estimataj kaj dankataj samideanoj,

Mi ricevis bonorde vian tre ŝatatan leteron de 9-a nov. 1977; kaj sincere petas vian bonkoran pardonon pro mia malfruiĝo tion agnoski al vi: pluraj ĉagrenoj kaj laboroj — parte rilataj al la temo de via informo — estas ties kaŭzo.

Mi tre dankus vin se miaj dankoesprimoj estos de vi ripetataj kaj al s-ro Hujucz kaj al profesoro sinjoro Ĉen Gingjun.

Tute speciale al s-ro Ĉen Gingjun mi dezirus klarigi kian kortuŝon li faris al mi: finfine, jen simpla, homa, trafa respondo! Vere, en multaj diskutoj mi ĉiam devis veni al jena konkludo: aŭ mi estas denaske freneza, aŭ miaj oponentoj tiaj. . . . Kial ili sisteme, korporacie, inundas infanajn kapojn per centoj kaj miloj da monstraĵoj, similaj al tiuj pri kiuj s-ro Ĉen Gingjun donis plej trafan refuton?

El la respondoj ricevataj de mi nur la via estas agnoskata de mi homa, trafa: aliaj diras "mi ne kompetentas", "mi opinias ke ili (tiaj prezentoj) estas trafaj kaj pravaj", ktp, ktp.

Mi esperas, ke ni finfine sukcesos ke ĉe ni instruado de matematiko kaj ĉiuj aliaj sciencaj branĉoj ĉesu esti koŝmaro por infanoj: eĉ se tio ŝajnas al vi neblaĵo, tra tiaj vojoj de mi malamegataj iras ĉe ni instruado de matematiko, eĉ lingvo!! En la prelego kiun mi faris en nia universitato, kie mi ĵus licenciĝis, sola la ĉina voĉo estis de mi laŭdata kaj ŝatata.

Kun rea danko, via persone kaj samideane,
Antonio Alonso Nunez

Loko de Peonioj

Heze-gubernio en la sudokcidenta parto de Ŝandong-provinco estas konata kiel "Loko de Peonioj". En aprilo de ĉiu jaro, kiam plene floras peonioj, la pli ol 3,000 muoj (1 muo=1.15 hektaro) da peoniaj kampoj de ĝiaj popolaj komunumoj ĉarmas kiel buntaj brokatoj.

La peonioj originaj de nia lando estas famaj pro siaj pompaj ĉarmaj floroj kaj estas ŝate kromnomataj "Reĝino de la Floroj". Antaŭ 400 jaroj la peonioj kulturataj en Heze-gubernio jam famiĝis. Sed je la fino de King-dinastio kaj la komenca periodo post la Revolucio de 1911, inundo de la Flava Rivero detruis la plejparton de la peoniaj kampoj, kaj krome pro teruraj impostoj kaj ekspluatado de bienuloj, la kulturado de peonioj tre malprosperiĝis. Antaŭvespere de la Liberiĝo, restis nur malpli ol 100 muoj da peoniaj kampoj kaj la nombro de specioj de peoniaj floroj reduktiĝis ĝis ĉ. 30 — la "Loko de Peonioj" ekzistis nur nominale.


Sekve de la fondiĝo de la popolaj komunumoj post la Liberiĝo, en ĉiu produkta brigado fondiĝis speciala kultura grupo de peonioj, kaj dank' al apliko de sciencaj kulturaj metodoj, rapide vastiĝis la kultura areo de peonioj ĝis 3,100 muoj kaj la nombro de iliaj specioj multiĝis ĝis 320.

La peonioj ne nur liveras ĉarmajn florojn, sed ankaŭ specon de valora drogo, ĉar ĝia radiko estas uzebla kiel kuracilo en la ĉina medicino.









HUA KIFANG:


Pri Ekspozicio de Metiartaĵoj

EN printempo de tiu ĉi jaro, la Ministerio de Malpeza Industrio kaj koncernaj institucioj kune okazigis la Tutlandan Ekspozicion de Metiartaĵoj.

Iutage, mi iris en la Pekinan Belartan Ekspoziciejon kun la homfluo. Oni diris, ke pli ol 12,000 metiartaĵoj estis montritaj tie, inter kiuj troviĝis verkoj prikantantaj la revoluciajn gvidantojn kaj veteranajn revoluciistojn, spegulantaj la socialisman epokon aŭ prezentantaj belajn pejzaĝojn de nia lando; kaj ankaŭ verkoj kun tradiciaj temoj pri mitoj, legendoj kaj historiaj personoj.

Mi trapasis la antaŭsalonon kaj eniris la ĉambron de floroj kaj bildoj. Ĝi estis ronda ĉambrego, sur kies muroj pendis multaj brodaĵoj.

Brodado estas tradicia ĉina metiarto. Unu el la kvar famaj specoj de ĉinaj brodaĵoj estas tiu de Suĝoŭ, kiu karakteriziĝas per delikateco kaj



Ebura skulptaĵo kun 41 globoj moveblaj unu en alia



Vizitantoj

klaraj nuancoj. Multajn vizitantojn altiris al si la giganta Suĝoŭ-a brodaĵo pri Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Hua en intima interparolo, titolita per “Se Aferoj Estas en Viaj Manoj, Mi Estas Trankvila.” Tiu eminenta verko estas farita de Suĝoŭ-aj brodistoj per pli ol mil specoj de koloraj fadenoj. Kun profunda amo, brodistoj de diversaj lokoj brodis ankaŭ portretojn de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Prezidanto Ĝu De kaj aliaj veteranaj proletaj revoluciistoj, esprimante la karmemoron de la popolo. Inter la ekspozajoj troviĝis unu harbrodaĵo el Ŝandong-provinco, titolita per “Negliĝo de Ĉefministro Ĝoŭ”. Ĝi estas brodita per nigraj kaj blankaj haroj de orientanoj kaj ankaŭ silkaj fadenoj por pliriĉigi la kolorajn nuancojn.

En la koridoro post tiu ĉambrego ekspozitiĝis diversaj bildoj el konkoj, plumoj, tritikaj tigoj, bovkornoj kaj arboŝeloj. La konkaj bildoj estas reliefoj el gravuritaj kaj poluritaj konkopecoj inkrustitaj en formon de montoj, akvoj, homoj, floroj, birdoj ktp. laŭ la natura formo kaj brileco de la konkoj uzataj.

En la konkobildo “Triumfa Kanto” farita de la Metiarta Fabriko Bejhaj de Guanghi la metiartistoj tre lerte utiligis diversajn konkojn kun malsama brileco por prezenti la varman atmosferon de la fiŝistoj revenantaj de riĉa rikolto en brila suno. La naĝantaj salikokoj faritaj el bovkorno estis tre versimilaj pro la diafana

Angulo de la ekspozicio



bluete griza materialo. Ankaŭ la grupoj faritaj el plumoj kaj la sciuroj faritaj el tritikaj tigoj estis tre vivecaj. La bildoj faritaj el arboŝeloj prezentas novan specon de metiartaĵo. La montoj lerte formitaj el arboŝeloj kun taŭgaj naturaj sulkoj faras tre bonan efekton kaj impresas per aparta stilo.

En la okcidenta halo de la ekspoziciejo montriĝis skulptaĵoj multspecaj, el jado, eburo, smeraldo, agato, koralo, kristalo, ligno ktp.

En neolitiko jam aperis jadaj ornamaĵoj en Ĉinio. En Ŝang-dinastio je pli ol 1600 jaroj a. K., la tekniko de frotumado de jado jam relative maturiĝis kaj en la 7-a jarcento oni jam povis fari homfigurojn el jado per frotumado.

Inter la ekspozajoj troviĝis multaj raraj trezoroj kaj la plej interesa el ili estis la pejzaĝa bildo “Ŝaŭŝan” el agato kun akvo interne de ĝi.

Klarigisto diris al mi, ke agato kun akvo interne de ĝi estas rara materialo. Okaze de vulkana erupcio antaŭ centmilionoj da jaroj, vaporo estis envolvita de lafo kaj poste fariĝis akvo je malvarmiĝo. Kun paso de tempo, la envolta tavolo iom post iom dikiĝis kaj formiĝis bela agato. La akvujo en ĝi similas al galveziko kaj la akvo povas flui en ĝi je kliniĝo de la agata peco.

Ĉe Ŝaŭŝan troviĝas la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ Zedong ĉirkaŭata de verdaj bambuoj kaj montoj. Por krei tiun artaĵon la verkinto vivis certan tempon ĉe Ŝaŭŝan por sperti tiean vivon. Dum sia kreado li aplikis plurajn artajn rimedojn kaj dank’ al kombino de reliefo kaj rondreliefo bone prezentis la pejzaĝon en proksima, meza kaj malproksima planoj en aranĝo originala kaj plaĉa.

La ĉina ebura skulptarto jam havas historion de miloj da jaroj. En tiuj belaj delikataj eburaĵoj skulptaĵoj kristaliĝis diligenta laboro kaj saĝo de skulptistoj. Antaŭ kelkaj jaroj, ekspozitiĝis peco de fama ebura globo de Guangdong-provinco. Ĝi konsistis el 38 globoj skulptitaj unu en alia. La ĉifoje ekspozata verko konsistis el 42 globoj moveblaj unu en alia. Ĝi estas vere majstra verko lerte farita. Tre interesaj estis

ankaŭ aliaj skulptitaj eburaj metiartaĵoj kiel drakboato, floroj, bambuoj, insektoj, birdoj ktp.

Mi rigardis kun ŝato grupon de grandaj eburaj skulptaĵoj titolitan per "Princino Venĉeng Eniras Tibeton". Venĉeng estis princino de Tang-dinastio. En la jaro 641 p.K. ŝi edziniĝis al la tibeta reĝo Sunzankampo. Ŝi iris al Tibeto kunportante diversajn metiistojn, kaj enkondukis la avangardajn teknikojn de han-nacieco al Tibeto, kiel ekzemple medicinon, ŝpinadon kaj teksadon, brodadon, ĝardenkulturon, paperfaradon kaj preparadon de vino. Ŝi ankaŭ konstruigis la templon Ramoĉe kaj planis la templon Cula-kang. Ŝi estis multe amata de la tibeta popolo.

La dirita verko detale prezentis Princinon Venĉeng, Sunzankampo, gvardianojn kaj palacajn servistinojn, entute 49 personojn. Ĝi prezentis scenon pri veturado de la princino survoje al Tibeto. La figuro de la princino estis majesta kaj bela, tiu de Sunzankampo impresis per eleganteco kaj braveco. Dek kvar gvardianoj ilin eskortis sur ĉevaloj en diversaj pozoj, kaj post ili estis dekkelkaj palacaj virinoj dancantaj aŭ ludantaj muzikilojn. Tie troviĝis pompa solena pordego, altaj pinarboj, belaj floroj kaj murmura fluo. . . Rigardinte tiun verkon, oni kvazaŭ vidis propraokule la kortsan historian scenon de solidareco kaj amikeco inter la hanoj kaj tibetanoj en la antikveco.

En la sudorienta halo de la ekspoziciejo montriĝis lakobjektoj kaj metalaj metiartaĵoj. La klozoneaj vazoj kaj enkadritaj bildoj inkrustitaj per oro kaj arĝento ĉiuj estas tre belaj kaj delikataj. Pavo el arĝentaj dratoj paradis per sia bela vosto, kies plumoj simbolantaj feliĉon estis tiel malpezaj kaj molaj. Oraj elefantetoj kaj enpotaj floroj el blanka jado kaj smeraldo ĉiuj disradiis eksterordinaran brilon.

Starante en kunpremita amaso, mi rigardis kun miro kvadratan lakpentraĵon kun larĝeco de 40 centimetroj. Ĝi prezentis 10 ruĝajn, flavajn kaj blankajn orfiŝojn ludantajn en lazura akvo. La skvamoj glimas, la vosto de la fiŝoj similas al silkaĵo kaj la akvoherboj balanciĝas en la fluo. La tuta bildo impresis per forta reliefo.

Tiu verko estis projektita kaj kreita de metiartisto Ĝeng Jikun. Li heredis la tradician teknikon de veteranaj artistoj kaj kreis sian novon. En farado de la orfiŝoj, unue li pentris per koloraj lako kaj ora kaj arĝenta pulvoro orfiŝojn kaj aliajn desegnojn, kaj poste ilin kovris per pluraj tavoloj da travidebla lako. Dank' al tia aranĝo, la orfiŝoj kaj aliaj desegnaĵoj reflektantaj lumradiojn de diversaj flankoj aspektis vivecaj.

La eksponaĵoj en la halo de vitraĵoj, fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj estis kapturte variaj. La ĉina ceramiko jam havas historion de pli ol kvar mil jaroj. La maldikaj porcelanaĵoj de la antikva urbo Gingdeĝen de Gianghi-provinco estas fame konataj pro siaj "maldikeco de papero, belsoneco de sonorilo, blankeco de jado kaj brileco de vitro". Ankaŭ la fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj de Tangŝan de Hebej-provinco ĝuas certan renomon internacian. Kvankam Tangŝan estis detruita de la forta tertremo en 1976, tamen ĝi rapide venkis la katastrofon kaj restarigis la produktadon sub la prizorgo kaj subteno de la tutlanda popolo. Ĉifoje oni eksponis specon de ore glazurita tetrinkilaro, kiu estis ne nur bonkvalita sed ankaŭ de originala stilo.

Post pririgardo, mi interparolis kun respondeculo de la ekspozicio kaj informiĝis, ke antaŭ la Liberiĝo, la ĉina metiarto disvolviĝis tre malrapide kaj iuj specoj de metiartaĵoj preskaŭ perdiĝis. Post la fondo de la popola respubliko, rejniĝis la veteranaj artistoj kaj rapide kreskis la junaj artistoj. Sub la orientado de la politiko elmetita de Prezidanto Maŭ Zedong "disfloru cent florojn", "elŝovu novon el malnovo", ili faris grandan kontribuon al disvolvo de la metiartaĵoj de nia lando. Nun en Ĉinio troviĝas pli ol 2,000 metiartaĵaj entreprenoj kun pli ol 300,000 laboristoj, dekkelkaj metiartaĵaj lernejoj kaj pli ol 50 metiartaĵaj institutoj pri fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj, brodaĵoj kaj eburaj skulptaĵoj.

Depost la jaro 1972, Ĉinio okazigis pli ol 140 metiartaĵajn ekspoziciojn en pli ol 90 landoj kaj per tio akcelis la internacian interŝanĝon de kulturo kaj arto.

Homoj Kriplaj tamen Nesenutilaj

LA blinduloj estas ordinare rigardataj kiel homoj senperspektivaj. Tamen, en nia lando la Partio kaj la registaro tre zorgas ilin kaj havigas al ili laboron. Antaŭ nelonge, mi vizitis la Pekinan Lernejon de Blindaj Infanoj kaj propraokule vidis blindulon-kuraciston Si Jujhua en laboro.

En la Lernejo de Blindaj Infanoj

Dum interleciona paŭzo, geknaboj aŭ ludis aŭ promenis du- aŭ trioje en la korto. En ĉambroj aŭdiĝis de tempo al tempo kantoj kaj arioj de *erhuoj* (ĉina violono), bambuaj flutoj kaj aliaj muzikiloj. Se mi ne vidus tion propraokule, mi ne kredus, ke tie estas mondo de blinduloj.

Je sonorila signalo por leciono, la blindaj geknaboj rapide reiris en siajn klasĉambrojn. Ankaŭ mi eniris la klasĉambron de la unua grupo de la triajara klaso. Dekkelkaj lernantoj atenteme sidis sur siaj lokoj kaj voĉlegadis la tekston, palpante folion de sia brajlaj lernolibro.

Ja estas nefacile por la blindaj infanoj plenumi la taskon de lernado.

Parolante pri sia lernado lernanto Gaŭ Juan-juan diris: “En la komenco mi trovis la brajlon tre malfacile lernebla. Mi devis parkerigi pli ol 50 literojn, kaj ellerni skribadon kaj legadon de brajlaj vortoj. Mi ofte faris erarojn. Tamen mi pensis, ke tiuj fundamentaj kapabloj estas necesaj por akiri kulturajn sciojn, kaj mi nepre ilin akiros. Se la instruisto donis taskon al ni kvarfoje palpi la vortojn, mi tion faris ok- aŭ dek-foje. Samtempe, mi ofte notis novaĵojn disaŭdigitajn, skribi taglibron kaj poemojn per brajlo. Post ekzercado en kelkaj jaroj, nun mi jam povas skribi 86 brajlajn literojn en ĉiu minuto.”

Lernejestro Tian, kiu akompanis min en pririgardo, diris al mi, ke la lernejo celas ne nur turni la lernantojn en kapablulojn en vivteno,

sed ankaŭ kulturi ilin en socialismajn konstruantojn kun revolucia idealo.

Nun, la lernejo havas sume pli ol 150 lernantojn. Ok-jaraj blindaj geknaboj povas komenci lernadon loĝante en ĝi. La tuta lernoperiodo estas ok jaroj. La lernoprogramo estas sama kiel tiu de la ordinara lernejoj escepte de pentrado. La nivelo de la diplomitoj egalas tiun de la diplomitoj de elementaj mezlernejoj.

En la nomita lernejo laboras sume 60 instruistoj kaj oficistoj. En ĉiu lernogrupa estas speciala instruisto, kiu aparte zorgas kulturadon de memstara vivipovo de la geknaboj, ĉar antaŭ la eniro al la lernejo plejparto de la blindaj geknaboj estis prizorgataj de sia familio kaj mankis al ili tia kapablo. Post trejnado dum unu semestro, la blindaj geknaboj jam povas prizorgi sian ĉiutagan vivon. Iuj lernantoj, kiuj havas iom da vidpovo, eĉ povas surkudri butonojn ktp.

Ĝaŭ Ŝulin, unu el la blindaj geknaboj intervjuitaj de mi, suferis denaskan malbonan vidpovon kaj tute blindiĝis kiam li lernis en la triajara klaso de elementa lernejo. Poste, li transiris en la lernejon por blindaj geknaboj. En la komenco, li tre malĝojis pro sia blindiĝo misopinianta, ke lia vivo estas senperspektiva. Post kelkjara kolektiva vivado sub la helpo de la instruistoj, li fariĝis optimisma iom post iom, kaj lia penso vigliĝis. Nun, li ne nur aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo, sed ankaŭ funkcias kiel vicsekretario de la ĝenerala filio de KJL en la lernejo.

En nia interparolo, Ĝaŭ Ŝulin rakontis al mi pri la edukado de revolucia idealo. Ili kelkfoje vizitis la Monumenton de la Popolaj Herooj antaŭ Tian-anmen-pordego sub la gvido de instruistoj kaj aŭskultis iliajn rakontojn pri revoluciaj bataloj de martiroj. Ili ankaŭ vizitis la subteran fervojon, gigantajn konstruaĵojn kaj pitoreskejojn de Pekino. Ĉie ili estis varme


akceptitaj kaj la klarigistoj detale prezentis tiujn lokojn al ili. Ĝaŭ Ŝulin diris: “Kvankam ni ne povis vidi, tamen ni mem perceptis, ke nia patrolando antaŭenmarŝas grandpaŝe. Ĉio ĉi tio donis al ni novajn fortojn.”

Ĉiusemestre en la lernejo, ili invitis maljunajn blindulojn rakonti pri suferoj en la malnova socio kaj invitis diplomitiĝintajn lernantojn al la lernejo por raporti pri sia laborado sub varma prizorgo de ĉiuj flankoj kaj bona plenumo de la produktaj taskoj. Tio konigas al la lernantoj, ke en la socialisma patrolando ĉiu, kiu volas servi al la popolo, povas fariĝi utila homo.

Kuracisto Ŝi Ĵujhua

Kiam mi eniris la unuan kuracĉambron de la Masaĝa Kuracejo de la Okcidenta Distrikto, akompanate de Ŝi Ĉeng, estro de la kuracejo, du homoj tuj sekvis nin subtenante malsanulon. Kuracisto en blanka kitelo iranta post ili kriis: “Kuracisto Ŝi! Kuracisto Ŝi!” Tiam, iu blinda kuracisto ĉirkaŭ 38-jara alvenis palpante. La paciento estis laboristo de la Unua Domripara Kompanio de Pekino. Li falis de skafaldo kaj kontuzis al si la talion tiel forte, ke li ne povis rektigi sin pro doloro. Post palpado la kuracisto konstatis ke lia lumba vertebraro iom delokiĝis. Demandante la malsanulon li forte ektiris lin kaj tiu ĉi ekkriis pro doloro. Tiam ŝi diris kun rideto: “Jam en ordo! Nekredeme la laboristo prove sin movis kelkfoje kaj vere ne plu sentis doloron. Li kaptis manon de la kuracisto kaj diris: “Vere miraklon vi faris!” Por la kuracado oni uzis nur kelkajn minutojn.

Ŝi Ĵujhua diplomitiĝis en la Blindula Masaĝa Kurso de Baŭding. Li entuziasme servas al la malsanuloj kaj strebadas ĉiam al pli alta nivelo de kuracarto. Li ofte studis masaĝan metodon kune kun aliaj kuracistoj, ŝanĝis la incitajn punktojn en praktikado kaj altigis sian arton. En kuracado de multaj kronikaj malsanoj, kiel ekz. delokiĝo de intervertebra disko, hipertrofia vertebrala inflamo, reŭmatisma artrito, lezo de kartilaga histo ktp., li atingis bonan efikon kaj estas amata de la amasoj.



Masaĝado

Ankaŭ la edzino de Ŝi Ĵujhua estas blinda kaj diplomitiĝinta en la antaŭe menciita lernejo. Nun ŝi laboras en la Kartonkesta Fabriko de la Orienta Distrikto de Pekino. Ili havas du infanojn: 6-jaran filon kaj 9-jaran filinon, kiuj ambaŭ estas naivaj, viglaj kaj amindaj kun brilaj okuloj.

Ili loĝis en la posta korto de la kuracejo. Mi ankaŭ vizitis ilian loĝejon el du vastaj ĉambroj. La bone meblitaj ĉambroj montris ke ili vivas bone. Kiam ni interparolis, aŭdiĝis ridoj de la ludantaj infanoj. Tiam, ŝi diris emocie: “Feliĉan epokon havas la nunaj infanoj. Kiam mi estis en tia aĝo, mi jam perdis la vidpovon!”

Kiam Ŝi Ĵujhua estis 6-jara, li suferis de morbito kaj febreĝis. Tiam, lia familio estis tro malriĉa por lin kuraci kaj liaj okuloj blindiĝis.

“En la malnova socio” diris Ŝi, “ni blinduloj estis malestimataj kaj insultataj, sed nun ni estas ĉie prizorgataj. Kadroj de la loĝantara komitato de nia strato kaj la amasoj ofte helpas nin en aĉeto de rizo, faruno kaj legomoj; vendistoj persone sendas la aĉetitajn bezonaĵojn al nia hejmo; kiam mi trapasas straton, preterpasantoj volonte min gvidas kaj iam eĉ akompanas min ĝis mia celloko. Kiam mi enaŭtobusigas, oni tuj cedas al mi sidlokon. En nia nuna socio ja ĉie estas miaj karuloj!”

Kanta de la juneco

(Elektitaj ĉapitroj)

(Daŭrigo)

Resumo de la antaŭaj ĉapitroj: Sub la edukado kaj influoj de komunisto Lu Giaĉuan kaj progresemaj gejunuloj, Lin Daŭging decidis sin jeti en la amasan batalon, tamen ŝin ĉiamaniere malhelpis ŝia edzo Ju Jongze. La lasta fariĝis obstaklo sur ŝia vojo al progresado, tamen mankis al ŝi sufiĉa kuraĝo por lin forlasi. Foje, por eviti persekutadon de spionoj, Lu Giaĉuan venis al ŝia hejmo por tranokti. Sed Ju Jongze rifuzis la peton kaj Lu estis arestita kiam li atingis sian loĝejon en tiu nokto. Pro la arestiĝo de Lu Giaĉuan, Daŭging profunde kulpigis sin kaj sentis grandan doloron, dum Ju Jongze male perdis neniom sian plezuron en malfeliĉo de aliaj. El tio ŝi ekkomprenis, ke ili jam ne plu povas kunvivi pro malakordiĝo en politiko.

Daŭging transloĝiĝis en alian pensionon kaj iom post iom liberigis sin el la deprimiteco kaŭzita de la arestiĝo de Lu Giaĉuan. Ŝi elkore ĝojis, ke ŝi venkis la malnovan memon kaj komencis novan vivon. Sed malebena estas la vojo de la vivo! Dume ŝi renkontis Daj Ju perfidulon el la revolucia vicaro. Daŭging, al kiu mankis batala sperto, erare prenis lin kiel gvidanton de partia organizo kaj malkaŝis al li ĉion, eĉ pri ŝia gluado kaj disdonado de flugfolioj postlasitaj de Lu Giaĉuan. Sekve ankaŭ ŝi estis arestita. Poste ŝi forfuĝis de la danĝero, dank' al la helpo de Hju Huj kaj Vang Hiaŭjan. Lin Daŭging iris al Dinghian-gubernio de Hebej kaj laboris kiel instruisto en iu elementa lernejo. Post nelonge subtera kompartiano Giang Hua venis kaj interligiĝis kun ŝi. Sub ŝia ŝirmo li mobilizis kamparanojn por organizi armitan ba-

talon. Li ankaŭ edukis Daŭging por unuigi progresemajn instruistojn kaj lernantojn kaj propagandi revolucion penson. La agoj de Daŭging ne povis eskapi la observadon de la lerneja aŭtoritato kaj ŝi apenaŭ povis eviti la danĝeron de aresto en iu ribeleca tumulto kontraŭ la lernejo. Kun helpoj de siaj lernantoj kaj iliaj gepatroj, ŝi tamen sukcesis eskapi.

La subtera partia organizo sendis Lin Daŭging al najbara gubernio por tie labori kiel privata instruistino en la familio de iu bienulo. Tie ŝi refoje propraokule vidis diboĉadon kaj kruelecon de bienuloj, profunde kompatis la multe ekspluatatajn malriĉajn kamparanojn kaj dungitojn kaj persone traspertis la klasajn subpremadon kaj antagonismon. En la rikolta tempo de tritiko de tiu jaro, la kamparanoj, sub la gvido de la Kompartio, faris batalon kontraŭ la bienuloj kaj rikoltis la tritikon, kiun ili kulturis per sia sango kaj ŝvito. En koluzio la bienuloj kaj loka registaro kruele subpremis la kamparanojn kaj la nomoj de Lin Daŭging kaj aliaj kelkaj jardungitoj, kiuj gvidis la batalon, troviĝis jam en la nigra listo. Por konservi siajn fortojn, la partia organizo aranĝis, ke Daŭging reiru al Bejping por labori tie.

Apenaŭ Daŭging elvagoniĝis en Bejping, ŝi renkontis Baj Liping, kiu antaŭe estis patriota junulino sed nun jam turniĝis en filmostelon dronantan en diboĉa vivo. Ŝi konsilis al Lin Daŭging edziniĝi al potenca riĉulo. Daŭging tre abomenis Baj Liping pro ŝia koruptiĝo kaj iel sin liberigis de ŝia ĝenado. Informiĝinte de Baj Liping pri la reveno de Daŭging al Bejping,

spiono *Hu Meng-an*, al kiu la duonpatrino de *Daŭging* antaŭe intencis edzinigi *Daŭging*, sekrete ŝin arestis. Malgraŭ torturado de la malamikoj *Daŭging* nenion diris kaj fine ŝi estis metita en karceron por politikaj arestitoj. En la malliberejo ŝi konatiĝis kun komunistino *Lin Hong*.

Ĉi sube estas la 20-a ĉapitro de la dua parto de la romano.

— La Red.

XX

En tiu nokto *Daŭging* neniel povis endormiĝi. La vundo doloris al ŝi: la brulvundo de fera stangeto en ŝia femuro jam pусis kaj ĉiuj ŝiaj ostoj kvazaŭ disrompiĝis. Tamen tio, kio plej ŝin kortuŝis kaj malhelpis de endormiĝo, estis la historio kaj vortoj diritaj de Ĝeng Ĝin. Kamarado *Li Vej*, tiu firma bolŝeviko batalis ĝis la lasta spiro. Ŝi pensis, ke kvankam la malamikoj ĉesas plu pridemandi ŝin, tamen ŝi devas esti preta — preta por batali kontraŭ ili antaŭ la tribunalo. Nun ŝi ne plu pensis pri morto. “Ni klopodu vivi, vivi ĝis la realiĝo de la komunismo en Ĉinio.” La vortoj de Ĝeng Ĝin tiel forte kuraĝigis ŝin, ke ŝi sentis kaj ĝojon kaj doloron en la animo.

“Eta *Lin*, ĉu vi ankoraŭ ne endormiĝis?” Jam estis postnoktomezo, la nebula lunlumo enfiltriĝis tra la fenestro; aŭdinte la pezan spiradon de *Daŭging*, Ĝeng Ĝin sciis, ke ŝi ankoraŭ ne endormiĝis.

“Franjo Ĝeng, mi cerbumas kion mi devas respondi, se la reakciuloj denove min pridemandos. Bonvolu doni al mi konsilojn, ĉar mi ne havas sperton.”

“Ĉu ia atestaĵo pri vi falis en iliajn manojn? Ĉu vi havas rilaton kun homoj de la partia organizo? — Diru la veron, se vi min kredas.”

Pri tiu veterana kamaradino plena de partia spirito *Daŭging* firme kredis sian observadon kaj ŝi diris malkaŝe:

“Mi havas nenian rilaton kun alia komunisto nek ian atestaĵon en iliajn manojn.”

“Do tre bone, kamaradino eta *Lin*, mi helpos vin laŭeble, se mi povos vivi pli da tagoj. Videble ili ne tiel atentis vin kaj etan *Ju*. Eble ili vin liberigos. Tial vi nepre devas insisti, ke vi ne estas komunistino, sed ordinara junulino senlabora. Se ili vin denove torturos, vi ankoraŭ tion eltenu kunpremante la dentojn. . . Via vundo estas tre grava, supozeble ili ne torturos vin plue. Malgraŭ ĉio, ni ne devas fleksiĝi antaŭ la malamikoj kaj nepre persistu en la batalo ĝis la fino — kredu, ke la fina venko certe apartenos al ni. Vi deziras fariĝi kompartiano, ĉu ne? Do tiamaniere vi povos fariĝi tre bona kompartiano, fariĝi glora soldato batalanta en plejfronto por paco kaj feliĉo de la homaro.” Tiujn vortojn Ĝeng Ĝin diris en unu spiro, kaj pro laco kaj malforteco ŝi ekspiregis. Sufoka tusado tiel multe ŝin doloris, ke ŝi longe ne povis paroli.

“Kamaradino Ĝeng Ĝin,” diris *Daŭging* per trema voĉo, prenante ŝian malgrasan molan maneton. “Mi neniam forgesos ĉi tiun nokton, neniam forgesos vian kuraĝigon. Mi nepre lernos de vi, lernos por fariĝi kompartiano kaj batalos ĝis la lasta spiro. Por ĉiam kaj per mia tuta vivo mi klopodos atingi tiun gloran tagon. Se mi mortos, mi ankaŭ petas la Partion ke ĝi akceptu min. . .”

“Kiel mi ĝojas, kara kamaradino!” En tiu peze malluma profunda nokto, kiam Ĝeng Ĝin varme kaj firme premis per ambaŭ manoj tiujn de *Daŭging*, subite la lasta estis tiel kortuŝita de tiu nobla kaj sincera amikeco, ke ŝi ne povis sin deteni de larmoj!

“Eta *Lin*, mi devas diri al vi,” denove ekparolis Ĝeng Ĝin post momenta silento, kaj ŝia voĉo restis same milda kaj kvieta. “Post la lasta pridemandado mi jam komprenis, ke ili ne lasos min vivi longe. . . Ili opinias, ke mi estas sendita de la Centra Komitato de la Partio, tial mi estas preta. . .”

Daŭging ŝtoniĝis de timo. Ŝi sentis, kvazaŭ ŝia koro estus abrupte forŝirita, ŝi forte kaptis la manojn de Ĝeng Ĝin kaj diris anhelante: “Franjo Ĝeng, kion vi diris? . . .”

Ankaŭ Ju Suhiu vekigis. Ŝi nebulis aŭdis la lastajn vortojn de Ĝeng Ĝin kaj terurite ek-kriis:

“Franjo Ĝeng, kion vi diris?”

“Nenion gravan,” mallaŭte diris Ĝeng Ĝin. “Mi kaj Lin Daŭging ne povas endormiĝi kaj ni interbabilas. Eta Lin, kial vi portas tian nomon similan al tiuj de bonzinoj?”

“Mia patro kredas je budhis-
mo, li volis mem fariĝi bonzo,
tamen domaĝis la kromedzinojn,
tial . . .” diris Daŭging viŝante
larmojn, “tial li donis al mi tiun
abomenindan nomon.”

Eta Ju ekĝojis kaj ekridis:

“He, sciu, mi denove songis
pri mia patrino!” diris ŝi kun
ĝojo akirita en sia songo. “An-
kaŭ mian frateton mi vidis.
Vidinte ke mi revenis de la
malliberejo, ili ĝoje min ĉir-
kaŭis . . .”

Ĝeng Ĝin viŝis larmojn por
Daŭging ĉe la maldekstra flan-
ko kaj supren tiris randon de
la litkovrilo por eta Ju ĉe la
dekstra, kaj poste ŝi diris mal-
laŭte:

“Jam malfrue, ni ĉiuj dormu. Denove inter-
venos la gardistoj, se ili nin aŭdos.”

Antaŭtagmeze de la sekvanta tago gardistoj
enpaŝis por irigi Ĝeng Ĝin al pridemando. Ĝeng
Ĝin diris kuŝante sur la lito:

“Tom atendu, lasu min kombi la harojn.”

Ŝi malrapide ordigis siajn molajn longajn
harojn kaj estis forportita.

Post nelonga tempo ŝi estis reportita. Kvazaŭ
lacigita, ŝi silentis dum sufiĉe longa tempo ku-
ŝante sur la tabullito. Kiam ŝi povis paroli, la



du samkarceraj amikinoj samtempe demandis
kun zorgemo:

“Franjo Ĝeng, pri kio ili demandis? Kiel iras
la juĝado?”

“Nenio grava. Ili demandis, ĉu mi resaniĝis.
Se ne, ili eble ŝanĝos por mi lokon.”

Eta Ju trankviliĝis. Tamen Daŭging dronis
en peza zorgo. Sed ŝi ne povis tion diri.

Dum la tuta antaŭtagmezo Ĝeng Ĝin mallaŭte
lernigis al ili kanton pri malliberejo. Tiu kanto
cirkulis en malliberejoj de Ŝanhajo, Hangĝou
kaj Suĝou post la jaro 1930.

*Malliberuloj, ho, malliberuloj de l' epoko!
Ni estas ne krimuloj kriminalaj!
Ni ĉiuj venis de la fajra fronto,
kaptitaj en la fronto klasbatala.*

*Ni estas ne krimuloj sed kaptitoj.
Kiel ajn oni nin turmentas,
boladas nia sang' en spito.
Nur nian korpon povas teni la kateno
kaj la karcero ferkradita,
sed ne nian ribel-spiriton!*

*Malliberuloj, ho, malliberuloj de l' epoko!
Kvankam formortis la martiroj en ĉi-loko,
batalas plu la postvivuloj.
La aĉaj manĝoj, muŝoj, puloj
povas fizike nin difekti,
sed ja neniam nin ekfleksi.*

*Malliberuloj, ho, malliberuloj de l' epoko!
Fiasko estas panjo de sukceso.
Kroĉiĝos fine l' venk' al nia hoko.
Ni penu hardi nin sen ĉeso!
Kaj ni batalu kun kuraĝo!
Ja certe venos tiu tago,
en kiu flirtos sur la ter' sunbrile l' ruĝa flago!*

La teksto estis tre longa. Pro malforteco Ĝeng Gin povis lernigi al ili nur la unuajn kaj lastajn strofojn, kaj ili tri sentis grandan plezuron en tiu antaŭtagmezo.

Posttagmeze ili tri endormiĝis de laciĝo. Kiam Daŭging estis vekita el sonĝo de tuŝado, Ĝeng Gin diris al ŝi mallaŭte:

“Kamaradino Lin Daŭging, mi nepre devas diri al vi kelkajn vortojn, ĉar probable mi ne vivos ĝis morgaŭ . . . Se estos ŝanco, bonvolu komuniki al la Partio: Mia vera nomo estas Lin Hong. En oktobro de la pasinta jaro mi estis sendita el Ŝanhajo al Bejping kaj malfeliĉe estis arestita nelonge post mia eklaboro, pro denunco de perfidulo. Mi ne malhonoris la Partion kaj batalis ĝis la fino per mia tuta forto. . . . Mi esperas, ke nia partio centoble pligrandigos la Ruĝan Armeon kaj fortigos la gvidadon en la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj, la fina venko certe apartenos al ni. Kara kamaradino, mi esperas, ke ankaŭ vi firme batalos ĝis la fino kaj penos esti inda bolŝevistino. . .” La belaj kaj grandaj okuloj de Lin Hong brilis

en la malhela karcero, ha kiel lume kaj varme. Ŝi kvazaŭ ne parolis pri morto — pri la lasta akto de sia vivo, sed estis kortuŝita de ia ĝojiga, ekscita kaj plej interesa afero. Ŝi lace fermis la okulojn kaj faris kelkajn spiregojn por iom ripozi. Subite ŝi malfermis denove la grandajn entuziasmajn okulojn kaj demandis Daŭging: “Lin, ĉu vi povas garantii, ke vi transdiros miajn vortojn al la organizo?”

Daŭging jam povis nenion diri. Ŝi forte kapjesadis larmante. Poste ŝi etendis ambaŭ manojn por firme teni la blankajn fingrojn de Lin Hong kaj longe fiksas sian rigardon senmove sur ŝia belega vizaĝo kvazaŭ skulptita el marmoro. . . Ŝia sango kvazaŭ estus koaguliĝinta, restis ĉe ŝi tiam en la kapo nur nebula penso kvazaŭ en sonĝo:

“Ĉu ankaŭ tia homo povas morti? . . .”

Nokte, antaŭ enlitiĝo Lin Hong demetis de sia korpo rozkoloran lanan veŝton kaj donis ĝin al Daŭging:

“Eta Lin, vi estas tre malforta, surmetu tiun ĉi veŝton.” Ŝi prenis poste, de apud la kuseno, delikatan platan kombilon alportitan kun ŝi el Ŝanhajo kaj ridetis al eta Ju: “Fratineto, ĉu vi ŝatas tiun ĉi kombilon? Mi volas donaci ĝin al vi kiel memoraĵon.”

Eta Ju jam ekkonsciis pri alveno de malfeliĉo, kaj ŝi kaj Daŭging ekploris samtempe. La nokto estis tiel obskura kaj nuboz, kaj ŝajne baldaŭ ŝtormos. Kiel neeltenebla senfina nokto!

En noktomezo estis malfermita la fera pordo. Lin Hong estis forportita per pordklopego. Elirante el la pordo ŝi etendis la manon al la du amikinoj. Kvankam ŝi ne povis premi iliajn manojn, tamen ŝi ameme diradis: “Adiaŭ, fratinetoj! Bone vin zorgu!”

Apenaŭ la pordklopego estis forportita el la karcero por malsanaj malliberuloj, kvazaŭ forta pluvo abrupte falus, skuis la noktan aeron super la tuta malliberejo la kriado:

“For la reakcian Kuomintangon!”

“Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!”

“Nevenkebla estas la komunismo!”

“Kamaradoj, venĝu nin!”

Komence estis nur la voĉo de Lin Hong, poste aldoniĝis tiu de pliaj homoj kaj pli poste tiu de kelkdek, kelkcent homoj. La kriado de sloganoj fariĝis pli kaj pli potenca, majesta kaj pasia, kvazaŭ la tuta kosmo estus plena de la alta kaj brava kriado.

Daŭging falis sur la tabulliton kaj kriis. Bra-kumante la rozkoloran veŝton ŝi kriis tutforte kune kun ĉiuj aliaj malliberuloj — kvankam ŝian malfortan voĉon eble neniu povis distingi.

Eta Ju ne kriis. Ŝi, kvazaŭ infano de kiu oni forprenis la patrinon, saltis de sur la lito kaj sin ĵetis al Lin Hong, kiam ŝi estis forportata eksteren:

“Franjo Ĝeng! Ne foriru, ne foriru! . . . Vi ne povas morti, vi ne devas morti!”

La postajo de ŝia kapo tuŝegis la muron, ŝi estis forte piedbatita je la talio de la gardisto en grandaj ledaj botoj. Ŝi svenis kun vizaĝo plena de larmoj.

Ne estis pafado. Post kiam Giang Hiaŭhian, la estro de la tria ĝendarma regimento, feroca gardhundo alsendita de Ĉiang Kajŝek, atingis Bejping, ĉiutage granda nombro da komunistoj kaj patriotaj gejunuloj estis malaperintaj, arestitaj aŭ mortpafitaj, kaj ankaŭ iuj estis sekrete murditaj. En tiu nokto, samtempe kun Lin Hong, dek reflekseblaj batalantoj estis enterigitaj vivaj.

Taj-a Popolo Celebris la Akvoverŝan Feston

de ŜUANG NA

LA sunbrila aprilo de Hiŝuangbanna, favorata per varmeta klimato kaj tre ĉarma natura pejzaĝo, estas la plej bela sezono de tiu loko en la tuta jaro.

Je la 14-a de aprilo, la hiŝuangbanna-a taj-a popolo kaj aliaj frataj popoloj solene kunvenis por celebri la tradician Akvoverŝan Feston de taj-a popolo.

En tiu tago Junginghong, la ĉefurbo de la Hiŝuangbanna-a Taj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco, surmetis al si festan kostumon. Ĉie regis pureco kaj ĝoja atmosfero de festo. En la urba centro, giganta olepentraĵo «Ĉefministro Ĝoŭ kun Ni en Celebrado de la Akvoverŝa

Festo» altiris al si multajn amasojn. Ĝi rememorigis al ili la feliĉan scenon antaŭ 17 jaroj: Ĉefministro Ĝoŭ venis al Hiŝuangbanna kaj celebris la Akvoverŝan Feston kune kun la taj-a popolo.

Frumatene de la tago, la suno leviĝis el nuboj, pli ol 50,000 taj-oj kaj aliaj naciecaj popolanoj de la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco en festaj vestoj, venis gongante kaj tamburante, kantante kaj dancante al Vanggiang-kiosko apud Lancang-rivero por celebrado. La junuloj en koloraj silkaj vestoj portis koloran tukon sur la kapo kaj glavon ĉe la talio. Ili estis elegantaj kaj bravaj. La junulinoj ĉarmis en belaj vestoj

kaj kun brilaj ornamajoj kaj freŝaj floroj sur la hartubero.

La celebran kunvenon de la Akvoverŝa Festo ĉeestis centraj gvidantoj kaj gvidantoj de Junnan-provinco, la subprovinco kaj gubernioj, fremdlandaj specialistoj helpantaj nin en konstruado, samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen, laborantoj de Pekino, Ŝanhajo k.a. en la subprovinco.

La kunvenon prezidis Daŭ Hing (taj-o), vicsekretario de la partia komitato de Ginhong-gubernio kaj Ĝaŭ Cunhin (taj-o), vicestro de la revolucia komitato de la aŭtonoma subprovinco, faris al ĝi paroladon. Li diris: La Akvoverŝa Festo de la kuranta jaro okazas en la tempo, kiam ni akiris grandan venkon en la batalo profunde malkaŝi kaj forte kritiki la "kvarpersonan bandon" de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan kaj la tuta aŭtonoma subprovinco estas en bonega situacio. Kaj hodiaŭ ĝuste estas la 17-a datreveno de la partopreno de Ĉefministro Ĝoŭ en nia celebra aktivado de la Akvoverŝa Festo. Li esprimis varman bonvenigon al la fremdlandaj specialistoj, la samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen, kamaradoj el Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj.

Post la parolado de Ĝaŭ Cunhin, komenciĝis gaja festa aktivado. Geknaboj en la kunvenejo ellasis milojn da koloraj balonoj, kiuj sin levis al la ĉielo. Komenciĝis tradicia aktivado de la taj-a popolo en la Akvoverŝa Festo, nome sible pafi petardojn faritajn el bambutubo al la ĉielo. Sur la rivero, pli ol dek drakboatoj komencis

konkurson, fendante ondojn ili flugis antaŭen kontraŭ la fluo. Tiu sceno entuziasmigis sen-nombrajn rigardantojn. "Rapidu! rapidu!" kriis la homamasoj. Pli ol 300 artistoj de la aŭtonoma subprovinco, Ginhong-gubernio, komunumoj, kultivejoj, sciencaj institutoj kaj aliaj prezentis al la amasoj multajn kantojn kaj dancojn kun nacia stilo, inter kiuj estis la taj-a tradicia "Pavo-danco", la han-a tradicia "Ludo de Draklanterno", ajni-aj kaj bulang-aj naciaj dancoj.

Akvoverŝo estis la plej interesa el la celebraj aktivadoj. Ĝi simbolas por la popolo feliĉon, bonan sanon, abundan jaron kaj naciecan prosperon. Ĝi estas ankaŭ aktivado plej ŝatata de gejunuloj. Ili reciproke esprimis per ĝi sian sentimenton kaj deziron. La akvoverŝo komenciĝis. Tenante sitelon, lavkuvon, poton, arĝentan bovlon oni priverŝis unu alian per la manoj. "Akvon! Akvon! Akvon!" Oni ĝoje kriis, postkuris unu alian, klaraj akveroj ŝprucis ĉie. Rigardu, junuloj, kiuj antaŭe tiel viglaj, nun postkurataj de knabinoj, klopodis por trovi elirejon kvazaŭ kokoj falintaj en akvon. Ju pli multe da akvo verŝita, des pli multe da ĝojo! En pluvo de disflugantaj akveroj oni kriis, kantis kaj dancis. Tio tre interesis kaj emociis la fremdlandajn geamikojn, kiuj neniam vidis tian scenon. Iu el ili pretervole kriis: "Interese! interese! Feliĉon! feliĉon!"

Je la 14-a de aprilo, 600,000 taj-aj popolanoj de la tuta aŭtonoma subprovinco ĉiuj faris akvoverŝan aktivadon en densaj arbaroj de Hiŝuangbanna, en urboj, komunumoj kaj vilaĝoj sur ambaŭbordo de Lancang-rivero.



La Akvoverŝa Festo



La Imperiestra Palaco

de SAN SIJUAN*

EN nia ĉefurbo Pekino troviĝas grandiozaj antikvaj konstruaĵoj, kiuj konsistigis la Imperiestran Palacon de la dinastioj Ming (1368-1644 p. K.) kaj King (1644-1911 p. K.), la plej lastaj du feŭdaj dinastioj en la historio de nia lando. Tiutempe oni nomis ĝin Ziginĉeng (Malpermesita Urbo). Post kiam la feŭdaj dinastioj estis renversitaj, ĝi portas la nomon Malnova Palaco aŭ Muzeo de Imperiestra Palaco. Post kiam surtroniĝis Ĝu Di (imperiestro Jongle), la kvara filo de la unua imperiestro Ĝu Juanĝang de Ming-dinastio, li ordonis en 1406, ke oni konstruu la palacon. La konstruado finiĝis en 1420. Ĝi estis konstruita imite al la palaco de Ĝu Juanĝang en Nankino, kaj estis pli majesta kaj impona. Ĝi okupas areon de 72.4 hektaroj kaj konsistas ĉefe el la interna kaj ekstera kortegoj. Ĝi sume havas ĉ. 10,000 ĉambrojn de ligna strukturo. La palaco estas ĉirkaŭata de muro alta je 10 metroj kaj kanalo larĝa je 52 metroj. En ĝi 24 imperiestroj de la du dinastioj efektiviĝis sian feŭdan regadon de pli ol 500 jaroj. Nun ĝi fariĝis vizitin-dejo.

Post Tian-anmen-pordego troviĝas ebena ŝtonplata "Imperiestra Vojo" kondukanta al Duanmen-pordego, kiu rigardas al la suda pordego Vumen de la palaco. Sur

la 10-metre alta pordego sidas la majesta konstruaĵo nomata Domo de Kvin Feniksoj, kiu estas la unua altaĵo de la palaco.

Interne de Vumen-pordego estas vasta korto kun la arkforma "Interna Ora Rivero" (la "Ekstera Ora Rivero" estas antaŭ Tian-anmen-pordego), super kiu kuŝas kvin lerte konstruitaj blankmarmoraj pontetoj. Norde de ĝi estas Tajhemmen-pordego, la suda enirejo de la ekstera kortego. Antaŭ la pordego gardstaras paro da grandaj brilaj bronzaĵoj kiuj impresis homojn per majesteco de la palaco.

Interne de Tajhemmen, vidiĝas Tajhe-halo kun korto de pli ol 30,000 kvadrataj metroj. La halo estas la plej granda konstruaĵo de ligna strukturo en la palaco. Ĝi havas 72 grandajn lignajn kolonojn, altas, inkluzive de la baza teraso, je 36 metroj, larĝas je 37 metroj de sudo ĝis nordo kaj longas je 63 metroj de oriento ĝis okcidento. La tegoltegmento estas kvarflanke klina. La kolonoj estas karmezine lakitaj, la traboj estas kolore pentritaj kaj la tegmento de flave glazuritaj tegoloj brilas sub la suno. Ĝi estas eminenta klasika kreaĵo de nia lando.


Tajhe-halo, Ĝonghe-halo kaj Baŭhe-halo kun malsamaj formoj kaj altecoj viciĝas unu post alia sur

┌-forma teraso de 25.000 kvadrataj metroj, alta je sep metroj, tial oni nomis ilin la tri grandaj haloj. La teraso havas tri etaĝojn, kies randoj estas ornamitaj per balustradoj de blankmarmoraj gravuritaj tabuloj kaj kolonetoj. De malproksime la trietaĝaj balustradoj vidiĝas kvazaŭ ondiĝantaj blankmarmoraj montoj unu super alia. Ĉe la malsupra parto de ĉiu tabulo, koloneto kaj elstara drakkapo estas truo por dreni pluvakvon.

Tajhe-halo estis loko, kie la feŭda imperiestro okazigis gravan ceremonion kaj publikigis ordonon al la tuta lando. Por montri la absolutan potencon de imperiestro la halo konstruiĝis tre impona kaj grandioza. En la pasinteco, kiam okazis grava ceremonio, imperiestro sidis sur la trono interne de la halo, ĉiuj ministroj kaj altranguloj genuis en la korto malplialta je dek metroj ol la trono. Oraĵ sonoriloj kaj jadaĵ ĉing-oj (speco de antikva frapinstrumento de Ĉinio) en la koridoro ekster la halo donis belajn sonojn, kaj el la orumitaj bronzaĵoj ding-oj (tripieda vazo) sur la trietaĝa teraso leviĝis incensa fumo. La ceremonia eskorto staris en vicoj de la halo ĝis Tian-anmen-pordego. Tia sceno simbolis, ke la feŭda imperiestro funkciigis sian regpotencon kiel "Filo de la Ĉielo". Sed tia epoko jam forpasis eterne. La

Simpla mapo de la Imperiestra Palaco

1. Vumen-pordego
2. Tajhemmen-pordego
3. Tajhe-halo
4. Ĝonghe-halo
5. Baŭhe-halo
6. Kianking-pordego
7. Kianking-halo
8. Giaŭtaj-halo
9. Kunning-halo
10. Imperiestra Ĝardeno
11. Venhua-halo
12. Donghua-pordego
13. Vujing-halo
14. Hihua-pordego
15. Angula turo
16. Senvumen-pordego



grandioza palaco kreita de la laboranta popolo estas protektata kaj laŭdata de la popolo de generacio post generacio kiel eminenta kultura heredaĵo de la ĉina nacio.


En la oriento de la tri grandaj haloj estas Venhua-halo, kaj pli oriente sin trovas Donghua-pordego, la orienta pordego de la palaco. En la okcidento de ili estas Vujing-halo, kaj pli okcidente estas Hihua-pordego, la okcidenta pordego de la palaco. Tiuj konstruaĵoj apartenas al la ekstera kortego de la palaco.

De la ekstera korto pli norden, trapasinte malgrandan placon, oni

atingas la belan Kianking-pordegon, la sudan pordegon de la interna kortego de la palaco. En la interna kortego troviĝas Kianking-halo sude, la loĝejo de imperiestro, kaj Kunming-halo norde, loĝejo de imperiestra edzino, inter kiuj estas la kvadrata Giaŭtaj-halo, malgranda kunvenejo de la interna kortego. En la orienta kaj okcidenta flankoj de la tri haloj estas tenejoj de vestaĵoj kaj skribiloj por imperiestro. Ambaŭflanke de la tri haloj estas pluraj pordegoj, kiuj kondukas al la orientaj ses loĝejoj kaj la okcidentaj ses loĝejoj por kromedzinoj

kaj oficistinoj de imperiestro. Ekster la loĝejoj estas respektive kvin samtipaj grupoj da domegoj, kie loĝis la gefiloj de imperiestro. Sudoriente kaj sudokcidente de la interna kortego troviĝas respektive grupo da domegoj, kie loĝis la imperiestra patro, liaj edzino kaj kromedzinoj. La interna kortego havas multajn kortojn kaj estis strikte aranĝita.

Post la interna kortego estas la imperiestra ĝardeno, kie staras grandaĝaj pinoj kaj cipresoj kaj diversaj elegantaj konstruaĵoj. Tiu ĉi loko estas bela kaj kvieta.



La panoramo de la Imperiestra Palaco

La supre menciitaj konstruaĵoj ĉiuj estas en la Palaco. Sur la kvar anguloj de la ĉirkaŭmurego konstruiĝis kvar turoj altaj je ĉ. 27 metroj, kun kruca firsto kaj tri tegmentrandoj unu super alia. Ili estas kuriozaj kaj belaj en strukturo. Kontraŭe al Senvumen-pordego, la norda pordego de la palaco, staras la arta monteto Gingŝan plena de pinoj kaj cipresoj. Sur la monteto troviĝas kvin altaĵoj kun po unu kiosko. En la tuta projekto de la palaco la monteto staras post ĝiaj ĉiuj konstruaĵoj.

En la komenco de konstruado de la palaco, tie laboris ĉ. 100,000 diversaj majstraj metiistoj kaj ĉ. miliono da laboristoj. Sub la produktaj kondiĉoj de tiama socio,

finkonstrui tiel grandiozajn palaĉajn domojn plene manifestis altajn saĝon kaj kreivon de la antikva laboranta popolo de nia lando. Sed tiu konstruado portis al ĝi grandan suferon. La ligno *nanmu* (*Phoebe nanmu*) uzata en la konstruo estis alportita de profundaj montoj de la provincoj Siĉuan, Gujĝoŭ, Hunan, Guanghi kaj aliaj, foraj je pli ol mil kilometroj. En tiu tempo la trafiko estis tre malfacila, la hakitaj lignoj devis atendi ĝis alveno de pluvriĉa somero por portiĝi el primitivaj arbaroj kaj poste transportiĝi tra riveroj al Pekino. En la historia literaturo estis jena noto: "Mil homoj eniris monton, sed nur kvincent povis sukcese reveni hejmen." Kiom da sango kaj ŝvito oni devis pagi por ĉiu kolono! Krome, trans-

portado de ŝtonaj materialoj estis pli malfacila. La blanka marmoro estis hakita en Fangŝan-gubernio sudokcidente de Pekino fore je 100 kilometroj, kaj aliaj ŝtonoj estis kolektitaj en montregiono de Hebej-provinco, tial la transporto estis pli malfacila. Por transporti la ŝtonojn al Pekino, en vintro laboristoj kaj kamparanoj devis unue verŝi akvon sur vojon por glaciigi ĝin kaj poste puŝglitigi sur ĝi la grandajn ŝtonojn; en somero ili devis unue meti trunkojn sur vojon kiel rulilojn kaj puŝis la ŝtonojn sur ili. Norde de Baŭhe-halo estas okulfrapa bloko de blanka marmoro sur la Imperiestra Vojo, longa je 16 metroj, larĝa je 3 metroj kaj dika je 1.7 metroj, sur ĝi oni delikate gravuris naŭ vivecajn drakojn en nuboj. Tiu ŝtono

post prilaborado pezas je pli ol ducent tunoj, kaj ĝia pezo antaŭ prilaborado devis esti 3-4-oblo de la nuna. Oni povas imagi al si la scenon, kiom da klopodoj la tiamaj laborantoj devis fari por transporti tiom da ŝtonoj!

Post la Opia Milito de 1840, Ĉinio turniĝis en duonkolonian kaj duonfeŭdan socion. Fronte al enlandaj malfaciloj kaj ekstera agreso, ĉu imperiestro, aŭ posta militarista registaro, aŭ reaktia kuomintanga registaro ĉiuj ne volis ĝin ripari kaj pro tio ĝi serioze kadukiĝis, ĉie rubaĵoj amasiĝis kvazaŭ monteto kaj sovaĝaj herboj kreskis ĝis alteco de homo.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, la palaco revenis en la manon de la popolo. La popola registaro fori-



Vançun-kiosko en la Imperiestra Ĝardeno

Interne de Tajgi-halo



gis 250,000 kubmetrojn da rubaĵoj, faris planon por ripari la palacon, starigis specialan riparan taĉmenton el veteranaj laboristoj. La ŝtato starigis institucion por esplori antikvajn arkitekturaĵojn. Surbaze de tio, oni prenas la palacon kiel objekton de arkeologia laboro kaj faris al ĝi delikatajn protekton kaj riparon. Samtempe oni faris sciencon ordigon kaj kompletigon al ĝiaj konservataj antikvaj objektoj kaj ekspozas ilin al la publiko. Nun, la ekspoziciejoj de sinteza arto, bronzaĵoj, porcelanaĵoj, teksaĵoj kaj brodaĵoj, pentraĵoj kaj metiartaĵoj jam malfermiĝas al rigardantoj. Por ke vastaj popolamasoj vidu kiel vivis imperiestroj, oni aranĝis iujn originajn objektojn kiel antaŭe en la palaco.

*La aŭtoro de la artikolo estas estro de la esplora fako de la Muzeo de Imperiestra Palaco.



HOLOGRAFIA MATERIALO


Koncernaj unuoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcesis fari novan holografian materialon — fotokondukan varman plaston kaj faris per tio kontribuon por disvastigi kaj apliki holografian teknikon en sciencaj studoj kaj industria produktado. Tia materialo superas ordinaran arĝentsalan materialon en multaj punktoj Ĝi malfermis novan situacion por vasta apliko de la holografia tekniko.

EKSPOZICIO DE EKSTERLANDAJ SCIENCAJ KAJ TEĤNIKAJ LIBROJ

De marto ĝis aprilo okazis en Pekino ekspozicio de eksterlandaj sciencaj kaj teĥnikaj libroj, aranĝita de la Ĉina Libroimporta Kompanio, kaj ĝi estis varme bonvenigata de vastaj amasoj de sciencaj kaj edukaj laborantoj.

La ekspozicio konsistis el dekkelkaj partoj, en kiuj ekspoziciĝis 14,000 verkoj, 5,000 gazetoj, 3,000 specialaj eldonaĵoj kaj aliaj materialoj pri agronomio, biologio, medicino, elektronika komputero ktp. Ili estis liveritaj de pli ol 1,000 eldonejoj kaj personoj de la mondo.

La fame konataj sciencistoj Jan Gici, Maŭ Jiŝeng, Jang Ĝongĝian, Giang Mingĝian, medicinisto Ĝin Ŝanbaŭ kaj aliaj vizitis la ekspozicion. Ĝin vizitis ankaŭ multaj ins-



truistoj, studentoj, laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Por kontentigi la peton de vastaj laborantoj de scienco kaj eduko, ekspoziciaĵoj estas montritaj ankaŭ en aliaj urboj de nia lando.

TURISMA VAGONARO

Lastatempe, aperis bela verda vagonaro sur la fervojo de Pekino ĝis Badaling en norda antaŭurbo de Pekino. La vagonaro estas speciale instalita de la ĉina fervoja departemento por eksterlandaj turistoj, ĉinaj elmigrintoj kaj niaj samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen kiuj volas viziti la Grandan Muron. Ĝi ekfunkciis en la unua de aprilo kaj ĉiutage transportas centojn da turistoj. Nur du horoj estas bezonataj por vojaĝo de Pekino ĝis la Granda Muro. Antaŭe oni kutimis viziti la Grandan Muron per aŭtobuso.

Nun ankaŭ Sanhajo, Nankino, Suĝoŭ, Vuhi, Hangĝoŭ, Fuĝoŭ, Gulin, Ŝaŭŝan kaj aliaj urboj kun pitoreskaj pejzaĝoj kaj vizitindejoj preparas por funkciigi specialajn turismajn vagonarojn.

HAN-DINASTIA TOMBARO PRIFOSITA EN GUANGHI

Lastatempe arkeologoj eltrovis kaj prifosis tombaron de Hاندinastio (206 a.K.-220 p.K.) ĉe Feng-

ŝuping de Ĝaŭping-gubernio de Guanghi. Inter la elterigitaj objektoj troviĝis pli ol 400 bronzaĵoj, fajencaĵoj, agataĵoj kaj bidoj. Krom bovloj, potoj kaj aliaj vazoj troviĝis ankaŭ vivsimilaj fajencaj figuroj de homoj, porkoj, hundoj, kokoj kaj anasoj.


LA UNUA MEDICINA INSTITUTO EN TIBETO

En la urbo Linĝi sur la altebenaĵo de Tibeto jam estas starigita la Tibeta Medicina Instituto, la unua en sia speco en tiu regiono. En ĝi lernas tibetaj kaj alinaciecaj studentoj.

Ĝi havas kvin fakultatojn inkluzive de tiuj pri kuracado, farmakologio, tibeta medicino kaj higieno. La studperiodo estas 5 jaroj.

Ĝia fondiĝo kreis favoran kondiĉon por kulturaj kuracistoj por tibetanoj, por studi pri oftaj malsanoj sur la altebenaĵo kaj altmontaj fiziologio kaj malsanoj kaj por disvolvi la kuracajn kaj higienajn aferojn de Tibeto.






La industria kvartalo de Ginan




Fonturbo Ginan

Ginan estas la ĉefurbo de Sandong-provinco. Ĝi situas en la mezokcidenta parto de tiu provinco kaj havas historion de pli ol 2,600 jaroj. Ĝi famiĝis pro multeco de fontoj. En la pasinteco oni priskribis ĝin per jenaj vortoj: "Ĉiu familio havas fontakvon, kaj ĉe ĉiu domo kreskas plorsalikoj". "Sub bela monto ĝin ornamas salikoj kaj lago kun lotusfloroj". Sed en la periodo de King-dinastio ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo, tiu urbo kun murmuraj fontoj plurfoje suferis tretadon de militaristoj kaj imperiistoj kaj nigran regadon de la reacia registaro de Kuomintango, kaj plejparto de la fontoj estis ŝtopita pro longtempa ne-riparado, la historiaj lokoj kaj pitoreskejoj dezertiĝis.



Daming-lago

La fonto Nigra Tigro



Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la urbo Ĝinan faris grandskalan socialisman konstruadon. Nun la areo de la urbo kaj la totala produktov valoro de ĝia industrio estas respektive 4-oblo kaj 20-oblo de tiuj de la malnova urbo. Antaŭ la Liberiĝo, en la urbo troviĝis nur kelkaj malgrandaj farunfabrikoj kaj ŝpinteksejoj, sed nun oni tie starigis industriojn de ŝtalo, fero, maŝinoj, aŭtoj, kemisterko, kemiaĵoj, radioaparatoj kaj aliaj. Oni faris plenan riparadon al Daming-lago, plantis multajn arbojn kaj florojn sur ĝiaj bordoj, renovigis kaj beligis la kadukajn kioskojn kaj pavilonojn. La Monton de Mil Budhoj plene kovras verdaj arboj. Kelkaj fame konataj fontoj aspektas pli belaj post riparo. Dank' al riparo kaj plivastigo, la Salto-fonto, la plej fama el la 72 fontoj, jam fariĝis la ĉefa parto de iu bela parko kun verdaj arboj, floroj kaj klara fontakvo. Ĝia areo pligrandiĝis je pli-ol-20-oblo.

La fontakvo de Ĝinan estas dolĉa, kaj ĝia temperaturo estas ĉiam je 18° C. La 4 fame konataj fontgrupoj de Ĝinan estas la Salto-fonto, la Fonto de Perloj, la fonto Nigra Tigro kaj la fonto Kvin Drakoj, el kiuj ĉiu havas sian apartan karakterizadon. La lazura Salto-fonto karakteriziĝas per furioza torento; la fonto Nigra Tigro per la muĝo de sia fluo simila al tiu de tigro; la Fonto de Perloj per fluo kun vezikoj similaj al perloj; la fonto Kvin Drakoj per kvietaj fluo simila al profunda abismo kun drakoj.

Ĉiuj tiuj fontoj kunfluas en Daming-lagon kaj formas la Klaran Rivereton, kiu multe beligas la urbon.


La Salto-fonto




La fonto Kvin Drakoj

La Fonto de Perloj






La fonto Jado en Lavado



La fonto Oraj Fadenoj



Ekzameno de fontakvo



Francaj Kamparaj Pejzaĝoj en Ĉinio

Antaŭ nelonge la Ekspozicio de Francaj Kamparaj Pejzaĝoj de la 19-a jarcento okazigita en Pekino kaj Ŝanhajo ricevis varman laŭdon de la ĉinaj rigardantoj.

Frue antaŭ duona jarcento francaj olepentraĵoj jam aperis en Ĉinio, inter ili la plej allogaj estis ĉefverkoj de la skolo de Barbizon. Poeziaj pejzaĝoj de Jean-Baptiste Corot kaj belaj pejzaĝoj de Theodore Rousseau kaj aliaj pentristoj delonge jam ĝuis ŝaton de la ĉinaj artistoj. Nun la ĉinaj vizitantoj kun aparta intereso aprecis la 86 ekspozitajn verkojn pri kampara vivo, ekzemple "Dono de Manĝaĵo", "Ventofrapo", "Plugado en Nivernais", "Unu Angulo de Vinberĝardeno Languedoc" kaj "Vidaĵo de la Ebenajo Saint-Denis".

"La Pago de Rikoltistoj" de Leon Lhermitte, "La Fojnoj" de Jules Bastien-Lepage kaj "Neĝa Pejzaĝo" de Gustave Courbet profunde impresis la rigardantojn. G. Courbet estis membro de la Pariza Komunumo kaj eminenta realisto. Li klare elmetis principon servigi arton al politiko kaj priskribi socian realan vivon. "La Fojnoj" kreigis en 1877. Post malsukceso de la Pariza Komunumo, ĉie regis depresio en la kamparo de Francio. En sia verko "La Fojnoj", la juna pentristo Lepage kreis malriĉajn kamparajn geedzojn. Li ne nur bildigis tipan



La Pago de la Rikoltistoj pentrita de Leon Lhermitte



Unu Angulo de Vinberĝardeno Languedoc pentrita de Edouard Debat-Ponsan

figuron de la laboranta virino sed ankaŭ priskribis ŝian senliman embarason en la koro. La laca edzo, kun malgrasa kaj malforta korpo, kuŝanta sur la mola herbejo aspektas kiel mortinto. Tio pli profunde spegulas ĉagrenon de la homoj peze ŝarĝitaj de la vivo.

J. B. Corot, pioniro de la francaj modernaj pentraĵoj, estas relative konata al la ĉinaj rigardantoj pro tio, ke liaj pentraĵoj tre similas al la ĉinstilaj pejzaĝoj tiel en etoso kiel en tekniko. Kvankam la ole-pentraĵoj de J. B. Corot tute diferencis de la ĉinaj tuĉaj pentraĵoj en speco, tamen liaj tekniko kaj kolorado en pentrado de arboj kaj folioj estas tre similaj al tiuj de la ĉina tradicia pentrarto. Tial liaj pentraĵoj tre interesis la ĉinajn rigardantojn.

La nomita ekspozicio estis nova paŝo en interŝanĝo de la ĉina kaj franca artoj. En septembro de 1975 okazis en Parizo "Podujara Arta

Festivalo", en kiu ekspoziciĝis 80 kamparanaj pentraĵoj de Huhian-gubernio de Ŝenhi kaj ricevis laŭdon de geamikoj de Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj. Por tiu ĉi ekspozicio amikoj de la koncernaj fakoj kaj artaj rondoj de Francio kolektis pli ol 80 valorajn pentraĵojn el 48 muzeoj de Parizo kaj aliaj lokoj de Francio, kaj tio ebligis al la ĉina popolo pli bone koni la pentran arton de Francio kaj plifortigis amikecon inter la ĉina kaj franca popoloj.

Finlandaj muzikistoj en Ĉinio

Finlando estas bela kaj riĉa lando de mil lagoj. En la jaro 1955, kiam la fame konata ĉina poeto Guo Mojuo vizitis ĝin, li verkis versaĵon pri ĝia natura trajto:

*Jen estas lando de mil lagoj,
multegas ĝiaj golfoj vere;
l' arbaroj ondas kiel montoj,
sennombras la insuloj stele.*

Kvankam Ĉinio kaj Finnlando longe distancas unu de la alia, tamen tio ne malhelpas amikajn kontaktojn kaj kulturajn interŝanĝojn inter la du popoloj.

En marto de la kuranta jaro la Finlanda Kvarteto konsistanta el unua violonisto Okko Kamu, dua violonisto Jussi Pesonen, aldviolonisto Esa Kamu kaj violonĉelisto Heikki Rautasalo vizitis Ĉinion invitite kaj faris prezentadon en Pekino kaj Ŝanhajo. Ili ludis la kordan kvarteton en D minora "Voĉo Intima", en kiu ili tre atentis pri esprimo de internaj sentimentoj, ŝanĝoj de malsamaj sentoj kaj ligoj de ĉiuj movimentoj de la komponaĵo, tiel ke la lirika verko kun freŝa stilo flue kaj delikate esprimis patriotan entuziasmon de la komponisto. En ludado de verkoj de

Vicprezidanto Tan Ĝenlin kaj membroj de la Finlanda Kvarteto



finlandaj modernaj komponistoj “Korda Kvarteto N-ro 3” de Joonas Kokkonen kaj “Korda Kvarteto N-ro 3” de Aulis Sallinen, ili faris apartan artan traktadon al tiuj du komponaĵoj tute malsamaj inter si en stilo kaj etoso.

La muzikistoj ludis ankaŭ kordan kvarteton en D majora “Alaŭdo” de

la fama aŭstra klasika komponisto F. J. Haydan. La ludado ne nur estis fidela al la fundamentaj trajtoj de la klasika originalo, sed ankaŭ esprimis optimismon, vigecon kaj entuziasmon. La kvar muzikistoj havas altan lertecon en arta tekniko. Dum la ludado ili plene montris malsamajn kapablojn kaj apartan superecon de violonĉelo kaj violo-

noj, kaj konservis harmoniecon kaj unuecon de la komponaĵoj. La ludado estis relative riĉa je ŝanĝoj de tembro kaj vasta en esprimivo de forteco. Ili bone ludis la prezentitajn instrumentajn verkojn kaj havas relative subtilan kaj precizan komprenon pri la komponaĵoj. Ĉio ĉi tio lasis profundan impreson al la ĉinaj aŭskultantoj.



Kontraŭimperiisma Patriota Jihetuan-movado

de SI GIN

POST la fiasko de la Moderniga Movado de 1898 fare de la ĉina nacia burĝaro, eksplodis la kontraŭimperiisma patriota Jihetuan-movado, kiu kun kampanoj kiel ĉefa forto alte tenis standardon de arma batalo. La heroa batalo de Jihetuan puŝis la batalon de la ĉina popolo kontraŭ agreso kaj dismembrigo fare de imperiismaj landoj al Ĉinio al alta tajdo post la Ĉina-Japana Milito de 1894, kaj sekve formiĝis la dua alta tajdo de la ĉina popola revolucia batalo en la moderna historio.

Jihetuan, komence nomata Jiheĉĵuan, estis sekreta societo de kampanoj kun iom da religia kaj superstiĉa koloro en la provincoj Ŝandong kaj Hebej kaj ĝia ĉefa tasko estis organizi amason kaj disvolvi movadon kontraŭ la regado de King-dinastio per ekzercado pri luktarto. Ĝi konsistis ĉefe el malriĉaj kampanoj, metiistoj, transportistoj, malriĉaj urbanoj, etkomercistoj, kolportistoj kaj aliaj. Ĝia

baza organizo estis “Tan” (altaro), kies sendependa unuo ordinare estis vilaĝo. En batala tempo ili invitis unu alian kaj batalis sub unueca gvido de granda prestiĝa ĉefo.

La fruperioda batala slogano de Jihetuan estis “oponi kontraŭ King-dinastio kaj restaŭri Ming-dinastion”. Sed post la Ĉina-Japana Milito de 1894, sekve de la intensiĝo de imperiisma agreso al Ĉinio kaj akriĝo de la naciaj kontraŭdiroj, la batala lancpinto de Jihetuan sin turnis al imperiismo. La imperiistoj prenis Ŝandong-provincon kiel unu el la gravaj agresaj kaj dismembri-gaj objektoj, ili faris tie diversajn krimajn aktivadojn sub la mantelo de religio, kio indignigis tieajn vastajn popolamasojn. Tial, kontraŭimperiisma batalo de Jihetuan unue ekflamis en Ŝandong. Laŭ la bezono en tiu situacio, Jihetuan ŝanĝis sian batalan sloganon je “subteni la registaron de King-dinastio kaj ekstermi la agresantojn”. Jihetuan sub la komando de

Ĝu Hongdeng estis unu el la plej grandaj organizoj en Ŝandong. En aŭtuno de 1899, kiam estiĝis konflikto inter Jihetuan de Pingjuan-gubernio de Ŝandong kaj la tiea eklezio, Ĝu Hongdeng gvidis Jihe-tuan-ajn soldatojn de pluraj gubernioj al tiu loko por partopreni en batalado. La kapitulaca kaj naci-perfida registaro de King-dinastio haste ordonis la provincestron de Ŝandong Ju Hian subpremi ilin, sed la trupo de la lasta ricevis fortan baton de Jihetuan kaj frakasiĝis. Post tiu venko, Jihetuan sub la gvido de Ĝu Hongdeng daŭre militiris al gubernioj Juĉeng, Ĉangking, Ĉiping, Boping k.a. De tiam la batalflamo de Jihetuan-movado pli kaj pli ardiĝis.

La imperiismaj landoj tre malamis Jihetuan. Sub la premo de la usona ambasadoro E. Conger k.a., la registaro de King-dinastio eksigis Ju Hian kaj anstataŭigis lin per Juan Sikaj, kiu venis al Ŝandong kun la nove konstruita tera armeo

de Tiangin sub sia komando kaj sange subpremadis Jihetuan.

En printempo de 1900, la Ŝandong-a Jihetuan eniris en Hebej-provincon kaj kuniĝis kun la tiea Jihetuan kaj formis kun ĝi grandiozan revolucionan trupon. La revolucia trupo militiris al Tiangin kaj Pekino laŭlonge de la Granda Kanalo kaj parto de la nuna Pekin-Kantona Fervojo. Survoje Jihetuan publikigis per afiŝoj la devizon "protekti la nordan ebenaĵon kaj forpeli la agresantojn", kaj la revolucia torento envolvis la tutan nordan Ĉinion.

En marto kaj aprilo, Jihetuan-a trupo eniris en Tiangin kaj propagandis, ke "Dio helpas Jihetuan, ĉar diabloj agresas nordan Ĉinion". Ĝi atakis karcerojn kaj konfiskis armilojn, kio teruris imperiistojn kaj mandarenojn de King-dinastio. Poste Jihetuan eniris en Pekinon kaj ĉie en ĝi starigis siajn flagojn, montrante sian firman decidon oponi kontraŭ imperiismo. Ili ĵuris mortigi Imperiestron Guanghju, liajn ministrojn Li Hongĝang kaj Ji Kuang kaj la aliajn naciperfidajn burokratojn. Jihetuan kun severa disciplino, ŝparema vivo kaj vigla batalvolo estis tre amata de la vastaj patriotaj amasoj. En mallonga tempo, Jihetuan efektive jam regis la Pekin-Tiangin-an regionon, kaj la registaro de King-dinastio estis sieĝata de la revolucia popolo.

Sub la influo de revolucia situacio de Pekin-Tiangin-a regiono, Jihetuan-movado disvolviĝis ankaŭ en Henan, Ŝanhi, Interna Mongolio, Nordorienta Ĉinio k.a. entute pli ol 20 provincoj de la tuta lando. Ĉie kie estis imperiisma agresado, leviĝis kontraŭimperiisma tajdo.

Vidante ke la registaro de King-dinastio jam ne povas regi la situacion, la imperiismaj landoj decidis rekte subpremi Jihetuan-movadon

per siaj trupoj kaj dismembrigi Ĉinion profitante tiun ŝancon. En la fino de majo de 1900, fremdlandaj agresaj trupoj senĉese surteriĝis ĉe Tanggu. Iuj el ili perforte invadis Pekinon kun preteksto de protekto de la ambasadorejoj kaj preĝejoj, aliaj eniris la koncesiajn kvartalojn de Tiangin. En Dagukoŭ kolektiĝis pli ol 8,000 agresaj soldatoj pretaj por grandskala invado. Je la 10-a de junio pli ol 2,000 soldatoj de Britio, Germanio, Rusio, Usono, Japanio, Francio, Italio kaj Aŭstrio militiris de Tiangin al Pekino sub la komando de la angla Admiralo Seymour. Survoje la agresantoj suferis fortan baton de Jihetuan kaj panike retiriĝis al Tiangin.

Tiutempe la urbo Pekino fakte estis superregata de Jihetuan. Se la registaro de King-dinastio publike komplotus kun la imperiismaj agresantoj por subpremi Jihetuan, ĝi estus tuj renversota de Jihetuan. Pro tio la Imperiestra Patrino Cihhi alprenis kontraŭrevolucionan taktikon de falsa subteno kaj vera perfido al Jihetuan, deklaris ke la Jihetuananoj estas fidelaj civiluloj, sed samtempe nomumis komandantojn por regi Jihetuan-trupojn. Sekve de grandskala invado de la agresata armeo, akriĝis iuj kontraŭdiroj inter la registaro de King-dinastio kaj imperiismoj kaj krome Jihetuan komencis sieĝi fremdlandajn ambasadorejojn, tial la Imperiestra Patrino Cihhi deklaris militon kontraŭ pluraj koncernaj landoj je la 21-a de junio. Post nelonge ŝi tamen klarigis al siaj fremdlandaj mastroj, ke la militodeklaro estis devigita kaj garantiis ekstermi Jihetuan per sia forto je oportuna ŝanco.

Okupinte la kanon-fortikajon de Dagu, la oklanda alianca armeo grandskale atakis Tiangin en du kolonoj laŭ akva kaj tera vojoj. Por defendi Tiangin Jihetuan koncentris

siajn fortojn al la loko. Ĝiaj trupoj heroe batalis kontraŭ la agresantoj. La intensa milito daŭris tutan monaton kaj sume ekstermiĝis pli ol 1,000 malamikoj. La usona kolonelo-komandanto, japanaj taĉmentestro kaj victaĉmentestro ĉiuj perdis sian vivon. Sed pro malvenko de la armeo de King-dinastio kaj subfoso de naciperfiduloj, la agresata armeo konkeris Tiangin je la 14-a de julio. Jihetuan evakuis en antaŭurbon de Tiangin kaj daŭre batalis kontraŭ la malamikoj invadantaj Pekinon.

En la mezo de aŭgusto, la oklanda alianca armeo proksimiĝis al Pekino. Jihetuan kaj parto de la armeo de King-dinastio persistis en heroa rezistado. Je la 14-a, kiam la oklanda alianca armeo eniris en Pekinon, la Imperiestra Patrino Cihhi kaj Imperiestro Guanghju panike forfuĝis en civilaj vestoj al Tajjuan kaj Hi-an. Kvankam Pekino portempe estis okupita de la agresata armeo, tamen la bravuloj de Jihetuan obstine rezistadis, kaj devigis la agresan armeon sange pagi por ĉiu antaŭenpaŝo.

Krom aliĝi al la oklanda alianca armeo per grandnombraj soldatoj la cara Rusio ankaŭ sendis 150,000 soldatojn en kvin kolonoj por invadi, en julio de 1900, Hejlonggiang-provincon de nia lando, kaj poste en septembro okupi la tutan Nordorienton de Ĉinio por efektiviĝi sian ambicion fondi flavan Rusion. La vasta nordorienta popolo faris heroan arman batalon kontraŭ la barbaraj agresantoj.

Ju pli multe imperiistoj okupis ĉinan teritorion, des pli profunde ili falis en ĉirkaŭatakon de la ĉina popolo. A. Valdersee, ĉefo de la oklanda alianca armeo diris ĝeme: "Nek landoj de Eŭropo, nek tiuj de Ameriko, nek Japanio kaj aliaj havas la mensan kapablon kaj armitan

forton por regi la kvaronon de la homaro. . . . Dismembrigi Ĉinion ja estas neracia politiko.”

Je la 7-a de septembro de 1901, la 11 imperiismaj landoj Germanio, Francio, Britio, Rusio, Usono, Japanio, Italio, Aŭstrio, Hispanio, Belgio kaj Nederlando devigis la registaron de King-dinastio subskribi la naciperfidan “Traktaton de 1901”. La traktato difinis: Fremdaj landoj povas teni garnizonon en la ambasadoreja kvartalo de Pekino kaj ambaŭflanke de la fervojoj de Pekino ĝis Dagu kaj de Pekino ĝis Ŝanhajuan; la registaro de King-dinastio devas kompensi al la agresantoj ĉ. miliardon da uncoj da arĝento en 39 jaroj; la ĉinaj ĉefaj impostoj inkluzive de dogana kaj sala impostoj devas esti regataj de imperiismo por garanti la rekompensan pagon; la ĉina popolo povas fondi neniun kontraŭimperiisman organizon. La traktato perdis al Ĉinio ne nur teruran sumon da mono, sed ankaŭ rajtojn en enlanda

regado kaj diplomatio. La naciperfida Imperiestra Patrino Cih ŝenhonte esprimis publike: “Iaŭ la posedaĵoj de Ĉinio ĝojigi la landojn en interrilato” kaj decidis fari lakeo fidela al imperiismo por regi Ĉinion. Kvankam fiaskis Jihetuan-movado subpremate de en- kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciaj fortoj, tamen ĝi montris la grandan forton kontraŭimperiisman de la ĉina popolo. La bravuloj de Jihetuan obstine batalis per primitivaj armiloj kontraŭ la agresantoj de ok imperiismaj landoj kun modernaj armiloj. Tio montris heroan revolucionan spiriton de la ĉina popolo batali ĝis fine kun imperiismaj rabistoj. Per sia heroaĵo Jihetuan disrompis la belan sonĝon de la imperiismaj landoj dismembrigi Ĉinion kaj malkaŝis la papertigrecon de ili kaj la reakciuloj de King-dinastio.

Prezidanto Maŭ Zedong montris penitence: “Ĉu la ĉina popola organizo Jihetuan iris al imperiismaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko kaj


al Japanio por tie fari mortigon kaj bruligon, aŭ diversaj imperiismaj landoj venis al Ĉinio por agresi ĝin kaj subpremi kaj ekspluati la ĉinan popolon, sekve de kio ĉinaj popolamasoj leviĝis por rezisti kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj koruptiĝintaj mandarenoj? Tio estas principa problemo kiu devas esti bone klarigita.” La viperaj kalumnioj de ĉiuj reakciuloj al Jihetuan-movado ja ne povis difekti la brilan gloron kaj historian meriton de Jihetuan.

La historia sperto de Jihetuan pruvis, ke la ĉinaj kamparanoj havas tre fortan revolucionon kaj estas la ĉefforto de la kontraŭimperiisma batalo de Ĉinio en la moderna tempo, sed sen la gvido de la ĉina proletaro kaj ties avangarda organizo Kompartio, ili ne povas akiri venkon. Kvankam Jihetuan malvenkis, tamen ĝia merito estas eterna kaj estas unu el la bazoŝtonoj de la granda venko de la ĉina popolo post kvindek jaroj.

KALENDOSKOPO

La Bebfišo

LA bebfišo (*Megatobatrachus Davidianus*) ricevis tiun nomon pro sia kvako simila al ploro de bebo.



La bebfišo de nia lando estas fame konata pro tio, ke ĝi estas granda, peza kaj tutkorpe plena je tuberetoj en vicoj. En zoologio ĝi estas speciala specio el la amfibiaj animaloj kun vosto kaj havas sciencesploran valoron. Nun nia ŝtato aplikas efikajn rimedojn por ĝin protekti, bredi kaj generi.

La bebfišo longas ĝenerale 1-2 metrojn kaj pezas pli ol 20 kilogramojn. Ĝia dorso kun nigraj makuloj estas malhele bruna, la koloro

Bebfiŝo


de la ventro pli hela, la kapo larĝa kaj plata, kaj en ĝia vasta buŝo estas dentoj similaj al tiuj de seĝilo. Ĝiaj naztruo kaj okuloj ambaŭflanke de la kapo estas ekstreme malgrandaj. La korpo estas granda kaj plata, kaj la vosto plata. Ĝi havas kvar piedojn dikajn kaj mal-longajn. La antaŭaj piedoj havas po kvar fingrojn kaj la malantaŭaj po kvin kun naĝmembrano inter la fingroj. La du flankoj de ĝia korpo kaj la malantaŭa rando de ĝiaj piedoj surhavas haŭtsulkojn.

La bebfišo vivas en montaj riveretoj altaj je 200 ĝis 1,000 metroj

super la marnivelo, kaj ofte sin kaŝas en kaverno malluma kaj riĉa je akvo kaj herbo. Ĝi prenas fiŝon, ranon kaj salikokon kiel sian nutraĵon. Ĝi timas lumon, tial en printempo kaj somero ĝi kuŝas ĉe la enirejo de kaverno por kapti manĝaĵon. En varmega tago aŭ vespero ĝi elrampas eksteren por serĉi nutraĵon. En aŭtuno kaj vintro ĝi iom post iom moviĝas al profundo de kaverno kaj vintre endormiĝas.

La bebfiŝo demetas ovojn en somero, kaj la idoj eloviĝas post ĉirkaŭ tri semajnoj. Bebfiŝidoj estas viglaj kaj ŝatas manĝi akvoherbon. La maturaj bebfiŝoj estas malmoviĝemaj kaj ofte atendas manĝaĵon kuŝantaj en kaverno. Ilia metabolo estas malrapida, kaj en akvo ili ne mortas eĉ sen manĝo dum unu jaro.

La viando de bebfiŝo estas bongusta kaj nutroza, kaj havas certan valoron en kuracado de anemio, disenterio kaj ĥolero.



Huabiaŭ — ornamita marmora kolono

Huabiaŭ—Ornamita Marmora Kolono

Antaŭ Tian-anmen-pordego staras paro da kolonoj skulptitaj el blanka marmoro. Supre de ĉiu kolono estas Roso-telero, sur kiu sidas iuspeca legenda besto kaj malsupre de kiu elstariĝas du nubaj platoj. Ĉiu kolono surhavas skulptitan gigantan drakon inter flosantaj nubblokoj. La kvar piedoj de la drako havas po kvin fingrojn. La skulptitaj drakoj estas kvazaŭ flugontaj. La du kolonoj estas nomataj *Huabiaŭ*.

Huabiaŭ havas longan historion. Historia libro notis, ke en la epoko de Jaŭ en legendo jam estis *Huabiaŭ*. Tiam oni starigis du lignajn kolonojn kaj interkruciĝe traboris ĝian supran parton per du lignaj pecoj. Ili simbolis ke la reĝo volas akcepti opiniojn kaj ankaŭ estis rigardataj kiel signoj de ĉefa vojo.

Depost Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.), *Huabiaŭ* ĝenerale estis farita el ŝtono. Poste, ĝi iom post iom fariĝis ornamaĵo antaŭ la palacoj kaj tomboj de imperiestroj.

Kvin-gusta Kokofemuro Stufita

La stufita kokofemuro estas fama plado de Ŝanhajo kaj karakteriziĝas per freŝa, dolĉa, acida, pika kaj bona gustoj.

Oni preparas ĝin per 150 gramoj da bona kokofemuro, 50 gramoj da oleo, 5 gramoj da salo, 5 gramoj da sukero, 5 gramoj da kareo, 50 gramoj da tomata saŭco, 2-3 gramoj da *vejging* (iu speco de spicaĵo), 5

gramoj da zingibro kaj tubajlo, kaj 10 gramoj da vino.

Oni unue fritas la kokofemuron en marmito, due metas en ĝin zingibron, tubajlon kaj vinon kaj 150 gramojn da supo kaj trie enŝutas salon kaj kareon. Post kiam la supo bolas, oni metas sukeron kaj brezas ĝin por 15 minutoj. Fine oni aldonas tomatan saŭcon kaj stufas ĝin du minutojn per forta fajro ĝis kiam la supo koaguliĝas.






NOVA ASTROMETRO

La unua vakua fotografia zenita tubo — alte preciza instrumento por determini tempon kaj latitudon —

de nia lando estas sukcese farita kaj komencis funkcii.

Ĝi liveras al nia lando precizajn donitaĵojn por determini norman tempon kaj koordinaton de la terpolusoj kaj servas kiel bona rimedo en studado de fundamenta teorio pri terpolusa moviĝo, nereguleco de la tera rotacio kaj plata tektoniko.

La instrumento estas farita de la Nankina Fabriko de Astronomiaj Aparatoj kaj aliaj koncernaj unuoj en kunlaborado en la jaro 1975. Ĝi estis muntita en la Tiangin-a Latituda Stacio de la Pekina Observatorio en 1976 kaj komencis uziĝi en observado en oktobro de 1977.



En la pasintaj kelkaj monatoj la instrumento funkciis normale kaj ĝiaj optika kaj meĥanika sistemoj pruviĝis bonaj.



Por Turismo kaj Amikeco

S-ro Rokuro Tokuda kaj s-ro Takenaka-Ĝisuke, japanaj perantoj de El Popola Ĉinio, kune organizis turisman grupon de japanaj legantoj de nia revuo sub la aŭspicio de la Esperanto-sekcio de Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Internacia Turisma Servo de Ĉinio. Tiu estas la unua turisma kolektivo

tiaspeca, kaj ĝi konsistos el dek du membroj kaj vizitos Pekinon en aŭgusto. Krom ekskursi al lokaj vidindaĵoj ili intervidiĝos kun la Esperanto-laborantoj en Pekino. Ili vizitos ankaŭ aliajn urbojn dum sia du-semajna turisma vojaĝo en Ĉinio.

La ĉinaj esperantistoj atendas kun ĝojo la viziton de tiu ĉi turisma grupo, kiu certe multe kontribuos al nia reciproka kompreno kaj amikeco. Ni deziras al ĉiuj membroj bonan vojaĝon.

Novaĵoj el Aliaj Landoj

Unua oficiala Koresponda Esperanto-Kurso en Kanado. Ĝi estas preparita oficiale de la Ministerio de Edukado en la provinco de Brita Kolumbio kaj mendebla por la tuta Kanado. La prezidanto de K.E.A. opinias ke tia ne ekzistas eĉ en tuta Usono. Nu, eble ankaŭ ne en aliaj landoj de la mondo.

La XVI-a Somera Esperanto-Universitato de Hungario okazos ĉi-jare en Gyulas de la 9-a ĝis 15-a Julio.

Nove Ricevitaj Libroj:

La Vivon Mi Prikantas: Ilustrita poemaro de Jope Hugo Ortegón kun 26 paĝoj en granda formato.

La Planedo Papagio: Fikcia studo pri la Teranoj fare de vivanto el stelo nomata Proto. Interesaj ri-

markoj pri la vivo de la homaro en okulo de eksterterano. Eldonita de Amigos de Lopez Luna (la aŭtoro), Casilla Correo 2507, Buenos Aires, Argentino.

Tonio Kroger: Verko de germana Nobel-premiito tradukita de japana admiranto Ŝ. Ujeki, rice-

vebla ĉe Japana Espo-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio, kontraŭ 950 En-oj.

**Instigoj al nova monda ekonomior-
ordo kaj efika helpo al evoluigo:**

La broŝureto estas verkita de d-ro Jozef Harti kiel la 4-a n-ro de Internacia diskutejo.

Horaro de la Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
Sabato kaj Dimanĉo 4:00—4:30	Vendredo kaj Sabato 20:00—20:30	Eŭropo	43 31 26	6860 9380 11500
Sabato kaj Dimanĉo 19:00—19:30		Japanio, Koreio	41 30	7315 9860
Sabato kaj Dimanĉo 20:30—21:00		Sudorienta Azio	25 19	11980 15080

Korespondi deziras

* Jovan Osap, jugoslavo nun laboranta en BR Germanio, 78 Freiburg/Brsg., Buggingerstr. 50/VI, BR Germanio, dez kor kun ĉina amiko.

* Thumerelle Jean-Claude, junulo 28-j., de l'avenir No. 3bis, 59130 Lambersart, Francio, dez. kor. kun

ĉinaj geesp-istoj k tiuj el aliaj aziaj landoj.

* Tomasz Sobiech, Poŝkesto 143, 21-500 Biala Podlaska, Pollando, dez. kor. kun ĉina esp-isto por interŝ. pm.

* S-ino Despina, Papadopoulou, st. Ganogianni, 75-Goudi 623,

Athenes, Grekio, dez. kor. kun ĉina esp-istino.

* Junaj anoj de Esp. sekcio E.L. "Kiril i Metodij" (12-15 j.), dez. kor. kun samaĝuloj de la tuta mondo. Skribu al instruisto: Ilija Popovski, nastavnik, Osn učilište, "Kiril i metodij", 97000-Bitola, Jugoslavio. Nia foto sube:



LA IMPERIESTRAL PALACO




Tajhemena-pordego kaj Ginŝuj-pontoj


Nigra Papago

(Hana popola rakonto)

Vortoj kaj bildoj de Jin Fengge, Ning Cengcun kaj Ge Tian



1. Antaŭ tre longa tempo vivis ĉarpentisto Liu San, kiu havis tre lertan papagon. Tiu birdo ne nur povis paroli sed ankaŭ lin helpi en laboro.



Gonghe-halo kaj
Baühe-halo

Interne de Tajhe-halo



Kianking-halo



Orumita leono antaü Kianking-pordego




2. Iutage, Liu San konstruis domon por la guberniestro. La papago portadis najlojn al li per la beko kaj lin amuzis per kanto.




3. La guberniestro tuj forte interesigis pri la birdo. "Venu," li vokis ĝin kun afektita rido, "bongustajon mi donos al vi." Sed la papago lin ignoris kaj forflugis.




Kiankiu-kiosko en la Imperiestra Ĝardeno



Plafono de Giaŭtaj-halo



4. En la sekvanta tago, la guberniestro sendis sian intendanton al Liu San por aĉeti la papagon, sed la lasta rifuzis. Ankaŭ la birdo diris: "Ne, papagon ne vendos!"



5. Ne povante havigi al si la papagon, la guberniestro terure koleriĝis kaj sendis pedelojn por kapti kaj enkarcerigi Liu San. (Daŭrigota)



Orfiŝoj en Akvo (lakpentraĵo el Fuĝoŭ)

Florvazo kun ume-
floroj (el Ĉongking)



LAKAĴOJ


(Pri verkoj en la Tutlanda Metiarta Ekspozicio)

La ĉina metiarto de lakaĵoj havas tre longan historion. En Ŝang-dinastio (de la 17-a ĝis la 11-a jarcento a. K.) oni jam lakis fajencaĵojn. En la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (ĉ. 11-a jarcento ĝis 771 a. K.) oni jam komencis fari lakaĵojn inkrustitajn per perlamoto. En nia lando sin trovas dek kelkaj ĉefaj produktaĵoj de lakaĵoj inkluzive de Fuĝoŭ, Pekino, Ĉongking, Ŝanhajo kaj Hi-an. Post la fondo de la popola respubliko, la metiarto de lakaĵoj ricevis disvolviĝon tiel en specoj kiel en formoj.

La lakaĵoj estas malpezaj, elegantaj, brilkoloraj kaj glataj kiel vitro, kaj krome imunaj kontraŭ putriĝo kaj korodo de acidoj kaj alkalo. La ŝel-lakaĵoj estas faritaj nur el lako dum la lignaj lakaĵoj enhavas lignan internaĵon. Ambaŭ spĉoj estas formitaj tra komplika procedaro kaj poluritaj je la fino. La lakaĵoj estas ornamitaj per diversaj manieroj, tiel ke iuj similas al bronzaĵoj aŭ fajencaĵoj, dum aliaj similas al objektoj el multekostaj ŝtonoj kiel agato k. s. Inter la ĉefaj lakaĵoj troviĝas ekranoj, florvazoj, homaj kaj animalaj figuroj, lakpentraĵoj, pokaloj, kruĉoj, taso, cindruoj, teleroj kaj skatoloj. Tiaj metiartaĵoj kaj belaj kaj utilaj estas de ĉiam ŝatataj de la popolo.



Telero inkrustita per perla-
motaj fenikso kaj peonio (el
Janggou)



Skatolo kun ruĝa bam-
bua desegno (el Giang-
hi)



Ruĝa skatolo en formo
de elefanto (el Fuĝou)



Vina trinkilaro kun peonia desegno (el Fuĝou)



8/15/78

李天
中国

